

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

El la naskiĝurbo de
Doktoro Esperanto

Proponoj de EPanino
Ljudmila Novak

Projekto 2014 de
François Degoul

Aktualaj problemoj de
zamenhofologio (2)

13a paĝo el la historio
de la Sukcena Lando

Geraldo Mattos pri la
participaj formoj

Aleksander Korĵenkov
pri “Lingvo Internacia”

Originala novelo de
Miĥail Korotkov



2009

3

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №3 (173)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2009, №3 (173).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 16 февраля 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

Kiu revekos la esperon?

Retvoĉdona epidemio iras tra Esperantujo. UEA-estrarano José Antonio Vergara, kiu mem prelegis en iu UK pri epidemioj, fariĝis tute lirika en siaj laŭdoj pri la reta kampanjo por subteni proponon al prezidento Obama pri instruado de Esperanto en usonaj lernejoj. Tiun kampanjon lanĉis la rusa mediaktivulo Oleg Izjumenko, kaj ĝi superregis la movadan novaĵmerkaton en januaro. Iuj eĉ pretis proklami lin Esperantisto de la Jaro, kiam oni ankoraŭ prifestis la pasintjaran laŭreatinon Ilona Koutny, kiu bezonis du jardekojn da silenta laborado por esti distingita.

Ŝajnas, ke la esperantistoj fariĝis same momentismaj kiel la cetera mondo. Skribante tiujn ĉi liniojn meze de februaro mi ne plu vidas la nomon de Izjumenko, kiam mi enŝaltas la komputilon, sed invitoj al reta voĉdonado pri tio kaj jeno ne ĉesis. Ankaŭ ne mankas postuloj, ke UEA subtenu ilin same kiel la Obama-kampanjon, kiu ricevis indulgeman aprobon de Osmo Buller. Lia aprobo venis kun prokrasto, eble pro interna konsiliĝo pri ĝusta sinteno al la surpriza popola movado. Se tia konsiliĝo okazis, ĝi lerte solvis la dilemon. UEA ne ligiĝis al la kampanjo per estrara decido, sed la direktoro nur murmuris, ke plivastigo de la instruado de Esperanto estas statuta celo de UEA kaj do subteninda. Tion la kampanjistoj povis preni kiel oficialan apogon kaj la pli sobraj animoj kiel nuran konstaton.

La retvoĉdona febroy estas simptomo de pli funda mal-sano: la movado, ĉekape UEA, ne havas strategion, sed oni saltas de unu hazarda ago al alia, kio ne konsistigas ĉenon de celkonscia agado. Siatempe la Manifesto de Prago kreis senton pri komuna agado por iuj celoj. Oni kritikis diversajn erojn en ĝi, kio estis natura, ĉar diri kompleksajn aferojn per du-tri frazoj lasas spacon por tio, sed esperantistoj amase aliĝis al ĝi per siaj subskriboj kaj dum kelkaj jaroj ĝi estis sur ĉies lipoj. Ne gravas, ĉu ili konis ĝian enhavon. Amasoj ne studas programojn kaj manifestojn nek eĉ supraĵe legas ilin. Se aktivuloj legas kaj ekentuziasmas, ili kontaĝas aliajn. La Manifesto trafis en 1996 komunumon, kiu troviĝis en senkonsila apatio post la batoj, kiujn ĝi suferis per la disfalo de la bastionoj en orienteŭropaj landoj kaj pro la ĉiam pli supervenka antaŭeniĝo de la angla, ankaŭ ĝuste en tiuj landoj. Per sia manifesto Mark Fettes tuŝis tiun akupunkturitan punkton en la kolektiva menso de esperantistoj, kiu katalizis novan esperon ĉe ili.

Ĉiu entuziasmo emas velki, ĉar la vivo ĉiam revenas al la ĉiutaga prozo. Laŭ la cirkonstancoj tio okazas pli aŭ malpli rapide. La Obama-tajdo glatiĝos rapide pro la ekonomia krizo. La Manifesto de Prago ŝoviĝis flanken, ĉar Fettes forlasis la scenejon kaj la novan estraron de Kep Enderby forlogis la tento provi reliefigi sin mem per iu alia nova ideo. Nenion novan ĝi trovis krom pavimi sakstraton, kiu kondukis al la demisioj en Zagrebo. Ĉu la lastatempa reapero de referencoj al la Manifesto fare de UEA-estraranoj estas provo reveki la iaman entuziasmon? Laŭdinda sed verŝajne vana provo. Kial ne provi resurscenigi ĝian aŭtoron? Kiel Obama, ankaŭ Fettes reprezentas la jarkolekton 1961.

Komitatano Z

Sur la kovrila kaj dorsa paĝoj estas fotoj pri Bjalistoko kaj Podlahio, afable disponigitaj de la Bjalistoka urbestro.

En la naskiĝurbo de Doktoro Esperanto

En Bjalistoko oni tuj sentas Esperanton. Veninte ĉi tien trajne, en atendo de eventuala renkontanto mi promenas en la stacidoma ĉefsalono kaj tuj trovas Esperantajn klarigojn en la informtabeloj. Ĉi tiu sento, la sento pri *niaeco* de Bjalistoko ne forlasas min dum mia tuta restado en la ĉi-jara kongresurbo.

De la stacio mi venas al la sidejo de la loka Esperanto-Societo (strato Piękna 3), mia provizora loĝejo, kun granda memorŝtono pri konstruota Monda Esperanto-Centro apud la enirejo. Tiu konstruota Centro neniam estis ekkonstruita, ĉar la epoko ŝanĝiĝis...

Kun Jarosław (Jarek) Parzyszek mi promenas tra la strato Zamenhof kaj spektas sur la muro de la domo 26 belan trietaĝan dekoracion, kreitan de la bjalistoka pentristo Andrzej Muszyński — infanoj en la supra balkono, Zamenhof en la balkono sub ili kaj du lokaj esperantistoj Jakobo Ŝapiro kaj Abrahamo Zbar en la fenestro sub la Majstro... Apude estas stando klariganta, ke ĉi-loke iam staris la familia domo de la Zamenhofoj.

Vicurbestro pli entuziasma ol la esperantistoj

Sed Esperanto-Centro ja estas konstruata. Alia centro. En alia loko. En la strato Warszawska 15 estas nun rekonstruata duetaĝa domo. Kvankam ĉe la unua ekvido de domo kaduka mi iom dubis pri la eblo rekonstrui ĝin dum mallonga tempo, la vicurbestro de Bjalistoko, Aleksander Sosna, certigas, ke ĝi estos malfermita antaŭ la kongreso.

“La urbo investis en la projekton pli ol dek milionojn da zlotoj kaj poste ni devos pagi ankaŭ la funkciadon, ĉar la esperantistoj ne kapablos vivteni sian Centron, — li diras kaj ŝerce aldonas: — se ni ne konstruigos ĝin, mi ekŝiĝos el la vicurbestra posteno”. Krom la Esperanto-Centro Zamenhof la urbo planas starigi novan monumenton Zamenhof, kiel donacon de Bjalistoko al la monda esperantistaro.

Sosna tre entuziasmas pri la kongreso, kaj li estas ankaŭ la prezidanto de LKK. Li rememoras pri la jam legenda vojaĝo de la urba delegacio al Jokohamo en 2006, kiu decidigis la kongreson en la naskiĝurbo de la Iniciatoro de Esperanto, kaj esperas ke esperantistoj de la mondo, malgraŭ la krizo, amase kunvenos ĉi-somere en Bjalistoko. Li



volonte respondas miajn demandojn pri la kongresejo, loĝado, manĝado (ankaŭ pri vegetara manĝado), pri invitiloj kaj vizitoj, pri diservoj, kaj pri promociado de Esperanto en la urbo. Li tamen emfazas, ke la urbo nur *subtenas* la kongreson finance kaj ideo, sed *organizas* ĝin UEA pere de LKK.

Post unuhora konversaciado kun la vicurbestro, en kiu ĉeestas ankaŭ Elżbieta (Ela) Karczewska kaj Nina Pietuchowska, ni iras en la oficejon de Ela, unu el la du vicprezidantoj de LKK. Ĉi tiun ĉambron la urbestro disponigis al LKK, kaj ĝuste ĉi-ĉambre la kongreso estas preparata. Ela rakontas tre detale pri la kongresa programo, speciale pri la artaj aranĝoj, kiuj estos nekutime riĉaj kaj interesaj.

Kun ŝi en la ĉambro laboras ankaŭ juna esperantisto Przemysław (Pŝemek) Wierzbowski, kiu ĉe nia alveno estis prilaboranta novan gvidlibron pri la urbo, kiun ricevos la kongresanoj.

ZEOj obsedas

Forlasinte la urboficejan domegon, mi lasas min al la gvido de Nina, kiu promenas min tra la urbocentro. Ni haltas apud la Zamenhofa monumento ĉe la skvaro inter la stratoj Spółdzielcza kaj Malmed, ĉe la domo de Jakobo Ŝapiro kaj memortabulo pri li en la strato Lipowa, ĉe la liceo №6 en la strato Warszawska, iama Reala Gimnazio kun memortabulo sciiganta ke en ĝi lernis la juna Ludoviko.

La sortimento de ZEOj en la urbo estas granda. Jarek promenas min aŭte kaj montras la stratojn Esperantystów kaj Antoni Grabowski, la novan bazlernejon №52 kun la nomo Zamenhof, kaj la porinfanan hospitalon Ludoviko Zamenhof. En ĉi tiu hospitalo — kiu estas la plej granda domo inter ĉiuj ZEOj en la mondo — troviĝas la salono *Esperanto* kun konstanta ekspozicieto pri la Internacia Lingvo kaj la ekzercosalono *Lidja Zamenhof* ekipita de la Bahaa Esperanto-Ligo.

Ĉiuj ekzistantaj kaj konstruotaj ZEOj (entute 15) estas kunigitaj kadre de la nova turista itinero *Esperanto* — unu el la kvar oficialaj urbaj itineroj apud la juda, ekzotika kaj kuirarta itineroj. Ĉe kelkaj Esperanto-punktoj jam estas instalitaj informstandoj en la pola, angla kaj Esperanto. Ĉe la Zamenhofa monumento oni starigos multmedian informilon en kiu oni povos spekti kaj aŭskulti prezenton pri la lingvo.


Ŝajnas, ke ZEOj obsedas min senĉese. Por la dua vespero mi estas invitita al Esperanto-leciono en la kafejo *Esperanto*, kiu situas en la koro de Bjalistoko — ĉe la malnova urbodomo sur la legenda foirplaco.

“Blovo de Esperanto”

“Ĝi estas nova kafejo, malfermita pasint-somere. La nomon *Esperanto Cafe* iniciatis nek la urbo, nek la esperantistoj, sed la posedantoj, — Pŝemek klerigas min. — Temas pri entrepreno kiu posedas kelkajn gastronomiejojn en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ili trovis ke pro la esperantista mondkongreso estus utile fondi kafejon, kie gastoj estos servataj esperantlingve, kaj ja estos la ebleco gajni”.

En ĉi tiu konstruaĵo dum kelkaj jaroj lernis Ludoviko.





Ĉi tiun centron la urbestro de Bjalistoko proprakoste konstruos por la monda esperantistaro kaj poste kovros la kostojn de la funkciado. Sed ĉu ni, esperantistoj, pretas subteni la Centron Zamenhof per regula vizitado?

La kafejo, kies salono povas samtempe akcepti cent personojn kaj multajn dekojn somere en la teraso, estas pli ol duone plena. Ja estas ne ordinara leciono, sed la kursfina solenaĵeto. En *Esperanto Cafe* okazis januare tri lecionoj, antaŭe ili pasis en la kafejo *Fama*. “Estis ne kutimaj tedaj lecionoj, — rakontas juna kursanino, — sed kvazaŭ renkontiĝoj kun la lingvo, prezento de esperantistoj lokaj kaj gastaj, de la Esperanta kulturo. Pŝemek instruis nur tre bazan vortprovizon prepare al pli funda eklerno de Esperanto”.

Kun plezuro mi revidas kelkajn LKKanojn, ankaŭ la vicurbestron Sosna, kiu trovis en sia streĉa tagordo tempon por vidi novajn esperantistojn. Li invitas min al la tablo, ĉe kiu mi konatiĝas kun Tomasz Wiśniewski, la aŭtoro de la pollingva libro *Ludwik Zamenhof*, eldonita en la jubilea jaro 1987. Tomasz nun gvidas popularan televidkanalon, kies skipo ĉeestas, kaj ĉe kiu lastatempe funkcias Esperanto-programoj.

Bela surprizo: “viva” muziko. Klezmera grupo *Chanajki* (kontrabaso, violono, akordiono kaj kantistino) prezentas tradiciajn kantojn en la jida, kiujn oni bone konas en la Orienta Eŭropo kaj en Ruslando: *Kringoj*, *Cigaretoj*, *Dona-Dona...* Tio kreas iom nostalgian humuron, kiu daŭras dum la tuta vespero. Joanna lerte gvidas la programon, en kiu ankaŭ mi devige partoprenas — ja la afiŝo informas pri la hodiaŭa gasto, la redaktoro de *La Ondo de Esperanto*.

Tamen kafejo estas kafejo, kaj en la menuo, apud tradiciaj manĝoj polaj kaj

internaciaj estas kelkaj specifajoj, ekzemple:

Salato *Esperanto*: ŝinko, fromaĝo kamemberto, nudelo, italaj laktukoj, kapsiko, tomato, kukurbeto, olivoj, fromaĝa saŭco, vinagrosauco, toasta pano (500g): 21,00 zlotoj

Kuko *Esperantika* (120g): 6,00 zlotoj

Deserto *Meksikano en Esperanto*: glaciaĵo, banano, ananaso, ŝaŭma kremo, glazuro (350g): 13,00 zlotoj

Teo *Blovo de Esperanto* (200 ml): 8,00 zlotoj

Dum la kongreso trovu tempon por gustumi ion el tiuj. Unu eŭro valoras ĉ. 4,50 zlotojn.

TV Esperanto

La televida skipo insiste petas intervjumon. Neplanitan. Post mallonga rezisto mi kapitulacas kaj ekrespondas iliajn demandojn. Kompreneble, en Esperanto.

Se temas pri la televido, la unua Esperanto-programo aperis antaŭ unu jaro. Iniciatis ĝin la Bjalistoka urbodomo, laŭ la ideo de Ela Karczewska kaj Bjalistoka Esperanto-Societo. Financas ĝin la urbo Bjalistoko. Ekde julio 2008 ĝin gvidas Pŝemek, unue en ITVC, kaj nun en *TV Białystok*.

Entute aperis 18 programoj, kaj ĉiuj programoj estas elŝuteblaj el la reto. Reveninte hejmen, mi spektis la 19an programon, kiu memorigis al mi la vesperon en la kafejo, sed krome estas en ĝi ankaŭ raporto pri la peto de la bjalistoka urbestro honori UEAn per la Nobel-pacpremio, sinprezento de *Pafklik* kaj ties nova lumdisko, konkurso

pri lignaj kabanaj, kaj tradicia prezento de historia poŝtkarto bjalistoka.

Devo de “ĉiu vera esperantisto”

Je la tria (kaj lasta) tago mi renkontiĝas kun Zbigniew Romaniuk, konata esploranto de la historio de Bjalistoko kaj de Podlahio. Li preparas novan studon pri Zamenhofoj en Bjalistoko, kiu enhavas kelkajn nekonatajn erojn. Post la renkontiĝo Jarek veturigas min al la juda tombejo, apenaŭ prizorgata en la lastaj jaroj.

La urbo ŝanĝiĝis. Preskaŭ nur juda en la tempo de Ludoviko, kun minoritatoj pola, litova, belorusa, rusa kaj germana, ĝi iĝis preskaŭ nur pola, kun iom da belorusoj kaj litovoj en kaj apud la urbo.

Precipe bedaŭrinda estas la malapero de la judoj. Antaŭ kelka tempo mortis la *lasta* judo, kaj nun restas neniu en Bjalistoko por bruligi la ĥanukajn kandelojn. Nur la tombejo, stratnomoj kaj monumentoj atestas pri la epoko, kiam en la urba foirejo nur unu butiko apartenis al nejudo. En la arbareto Pietrasze staras monumento al bjalistokanoj mortigitaj tie, inter alie Jakobo Ŝapiro kaj lia familio.

Tiun epokon memorigas ankaŭ la vojaĝanta ZEO — la trajno *Zamenhof* cirkulanta inter Bjalistoko kaj Bielsko-Biała. Tamen mi iras ne sud-okcidenten al la urbo de Georgo kaj Margareta Handzlik, sed orienten al Grodno, kie atendas min universitata profesoro, esploranto de la vivo de Zamenhof en Grodno, iama centro de la gubernio al kiu Bjalistoko apartenis. Mi do elektas alian trajnon. Sur la kajo mi kaj Jarek ĝisrevidas. Sed iam mi revenos al Bjalistoko, urbo tre kara por mi.

Almenaŭ unu fojon viziti la urbon, en kiu naskiĝis Ludoviko Zamenhof kaj en kiu li vartis sian infanan ideon pri lingvo paciga, estas preskaŭ devo de “ĉiu vera esperantisto”. Kaj la 94a Universala Kongreso ĉi-julie estas bonega okazo por plenumi ĉi tiun devon.

Aleksander Korĵenkov

94a Universala Kongreso

<http://94uk.bialystok.pl>

Esperanto en Bjalistoko

<http://espero.bialystok.pl>

TV Esperanto

<http://tvbialystok.pl/tvesperanto>

Kafejo Esperanto

[http://www.esperanto-cafe.](http://www.esperanto-cafe.pl/home.eo)

[pl/home.eo](http://www.esperanto-cafe.pl/home.eo)

Novak: “Atentigi pri Esperanto”

En la Eŭropa Parlamento (EP) la portugala parlamentano Vasco Graça Moura prezentis raporton pri multlingvismo, kaj tiusence oni preparas debaton kaj akcepton de la dokumento kiel bazo por posta parlamenta rezolucio pri multlingvismo. La slovena parlamentano Ljudmila Novak responde al tiu raporto prezentis tri amendojn en la komitato pri kulturo kaj edukado, per kiuj ŝi atentigas la parlamenton pri Esperanto. La amendoj rilatas al punkto 4 de la raporto kaj tekstas jene:

4a) ... konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel “lingua franca”.

4b) ... proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, respektante lingvan diversecon kaj stimolante lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.

4c) ... konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunujo ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efikojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus la uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

Laŭ Novak, interparoloj pri ŝiaj amendoj okazis en la komitato pri kulturo kaj ŝi ne havis tie amasan subtenon, do al ŝi klaras ke ŝiajn amendojn oni malakceptos en la fina dokumento de la Komitato. Sed ŝia celo estis atentigi la parlamentanojn, ĉar evidente en ĉiuj politikaj grupoj oni devos trakti ŝiajn amendojn, pri la ekzisto de Esperanto kiel ebla rimedo por justa lingva solvo en Eŭropa Unio.

Tiusence en ŝia paĝaro estas la eblo voĉdoni por la subteno al la menciitaj proponoj. Tiuj subtenoj ne influos al iu ajn decido de la parlamento, sed ili estos grava argumentu por ŝi dum la debato.

EU malfermis vastan konsultiĝadon kun eŭropaj civitanoj pri ĉiuj aspektoj de la vivo en nacilingvaj paĝaroj de unuopaj landojn pri tio kion la civitanoj proponas por plibonigi EU-on. Pluraj esperantistoj proponis en tiuj konsultiĝaj paĝaroj ankaŭ Esperanton. La proponoj pri Esperanto troviĝas ĉe belga,



Ljudmila Novak

franca, itala, hungara, estona, brita, irlanda kaj slovena paĝaroj.

Per niaj proponoj pri Esperanto en tiuj paĝaroj kune kun la proponoj de Ljudmila Novak ni certe interefikos videble en la periodo de elektoj por la Eŭropa Parlamento al la politikistoj de EU. La kandidatoj simple devos legi tiujn paĝarojn, ĉar ilian kampanjon ili devos formi laŭ la bezonoj de civitanoj kiuj esprimiĝos pere de tiuj konsultiĝoj.

En Francio (eble ankaŭ en Germanio) en la balotoj prezentiĝos partio *Eŭropo-Demokratio-Esperanto*, kiu diskonigos nian lingvon en tiuj landoj.

Ljudmila Novak kaj Margareta Handzlik verŝajne ankoraŭ kelkfoje agos publike por Esperanto antaŭ la balotoj, kaj ankaŭ tion rimarkos la publiko kaj medioj. Ni esperu ke en la sekva mandato estos pli ol du esperantistoj en EP.

Zlatko Tišljar

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)

Verdula sukceso en Germanio

La Verda Partio en Germanio inkludis mension pri Esperanto en sian Eŭropo-Programon okaze de la balotoj al la Eŭropa Parlamento en junio 2009. La amendo kiun verkis Diana Siebert, estis kunmetita kun alia propono kaj bedaŭrinde iom reduktita.

Ĝi tekstas: “Zur Sprachenvielfalt gehören auch die Minderheitensprachen sowie Esperanto” = Al la lingva plureco apartenas ankaŭ la minoritataj lingvoj kaj Esperanto.

Manfred Westermayer



Eventoj

MSF-8: Libero por la lingvoj

1 feb 2009 en la brazila urbo Belém post sestaga intensa laboro finiĝis la 8a Monda Socia Forumo. Ĝi kunvenigis cent mil aktivajn alimondistojn, kiuj esence kontraŭas la kapitalisman mondordon, kies ĉefaj figuroj samtempe kunvenis en la svisa Davoso.

Partoprenis la Forumon movadoj religiaj, feminismaj, kontraŭrasismaj, ekologiaj kaj indiĝenaj, maldekstraj partioj, studentaj organizoj kaj kelkaj ŝtatestroj, inkluzive de la venezuela socialisma prezidento Hugo Chávez. Inter la partoprenantaro estis grupeto da esperantistoj, kiuj disvastigis per flugfolioj sian tripunktan programon:

1. Lernejanoj rajtu elekti fremdan lingvon por studi (ne nur la anglan). Ekzemple, en Brazilo la hispana estas tre grava kaj multe pli uzebla, ĉar ĉiuj najbaraj landoj estas hispanparolantaj.

2. Ĉiuj homoj rajtu uzi sian dialekton sen esti antaŭjuĝata pro tio.

3. Oni elektos internacian neŭtralan lingvon kiel ilon por komunikado en la internaciaj rilatoj.

31 jan Miguel Vianas prezentis ĉi tiujn ideojn kaj Esperanton en sia prelego *Libero por la lingvoj*.

Miguel Vianas

Forumo ne nur en Belém

Samtempe kun la 8a Monda Socia Forumo en Belém okazis lokaj forumoj en pluraj landoj. Tian forumon en la ĉefurbo de Meksiko partoprenis Meksika Esperanto-Federacio (MEF).

La standon de MEF (*vidu la foton maldekstre*) aranĝis Mallely Martínez, Morayma Martínez, Martin Schaeffer kaj Daniel Moreno. Partoprenis aliaj aktivuloj de MEF: Raúl Anguiano, Gabriel Jiménez, Javier Vásquez kaj Guadalupe Vega, Margarita Vázquez.

Ĉe la stando oni montris diversajn materialojn pri Esperanto kaj disdonis flugfoliojn. 30 jan la standon vizitis teamo de la televidkanalo TeleSUR. En la samtaga novaĵprogramo ĝi montris la standon kaj menciis, ke prezentiĝis ambiciaj projektoj kiel valuto por Sudameriko kaj internacia lingvo.

Sed plej gravaj estis personaj interparoloj kun la ĉeestantoj — multaj personoj vizitis la standon kaj parolis kun ni. La intereso estis granda kaj la homoj ĝenerale tre malferme aŭskultis.

Mallely Martínez Mateos
Martin Schaeffer



KS en Jokohamo: Junaj aziaj esperantistoj frontas problemojn kaj diskutas por solvi ilin.

La 27a KS en bluĉiela Jokohamo

Komuna Seminario (KS) estas junulara evento inter ĉina, japana kaj korea junularoj, kiu ĉiujare kaj alterne okazas en tri aziaj landoj (Ĉinio, Japanio kaj Korea Respubliko). 27–29 dec 2008 okazis la 27a Komuna Seminario en Junulara Gastejo de Jokohamo kun la partopreno de 56 homoj konsistantaj el 35 japanoj, 14 koreoj, po unu el Ĉinio, Svislando, Malajzio, Usono kaj Hispanio kaj du infanoj.

Vespere de la 27a studentinoj el Sofia-Universitato en Tokio inaŭguris la seminarion per mesaĝo rilata al mediprotekto. Sekvis salutoj de TEJO kaj sinprezentoj. Poste nova temkanto de KS estis prezentita, kaj komenciĝis Amika Vespere kaj fine Kandela Nokto. La seminariejo estis lumigita per kandeloj, en kies lumo oni konversaciis.

La duan tagon komence okazis tri aranĝoj: Esperanto-kurso, ateliero pri farado de notlibroj el uzitaj paperoj, kaj diskuto pri junulara movado en Azio. Posttagmeze okazis gruplaboro pri la ĉeftemo *Ekologio en nia ĉiutaga vivo*. Komence ni grupe difinis la vorton “ekologio” kaj prezentis la rezultojn. Kaj poste ni faris “Ekologian Manifeston” dividite en 6 novajn grupojn. Poste ĉiuj grupanoj prezentis sian manifeston en aliaj grupoj; fine ĉiuj voĉdonis por la ŝatataj manifestoj. La unuan premion gajnis Grupo 2 kun manifesto “Atente, bone pensu” kun siaj simpleco, fundamenteco kaj impona desegno.

Vespere okazis bankedo en japana restoracio proksime de la seminariejo. Ni manĝis frandaĵojn kaj drinkis senlime. Nokte okazis reta konferenco kun la partoprenantoj de samtempe okazantaj “Internacia Seminario” en Germanio kaj “Ago-Semajno” en Slovakio.

La lastan tagon okazis fermo, kaj post la tagmanĝo en la najbara parko, ni promenis de la kongresejo tra Jokohamo, la seminaria urbo. La vetero estis ideala kaj ĉiuj ĝuis la promenadon.

Estis diskutita la situacio de la junulara movado en Azio. Nun funkcias junularaj organizoj nur en Japanio, Koreio, Ĉinio, Vjetnamio, Nepalo, Irano kaj Israelo. Bedaŭrinde, en aliaj landoj la junulara organizo ne ekzistas. Song Ho-young (prezidanto de Korea E-Junularo, komisiito de TEJO pri Azio) resumis la manojn en la junulara movado:

1. Komunikado inter aziaj junularoj kaj TEJO;
2. Seriozemo pri respondeco;
3. Stabileco;
4. Datumoj de antaŭaj KS-oj;
5. Sufiĉa financo;
6. Apartenemo de junuloj al organizoj kaj grupoj;
7. Lingve kompetentaj junuloj.

Laŭ la statistiko la nombro de la partoprenantoj ĝis la 11a KS ĉiam superis 100 (la plej granda estis KS en 1992 en Gyeongju, Koreio, kun 193 partoprenantoj), krom KS-oj okazintaj en Japanio, tamen en la lastaj jaroj partoprenantoj estis malmultaj: 18 en Iksan en 2004, 30 en Kamogawa en 2005, 18 en Pekino en 2006 kaj 50 en Iksan en 2007. Tiun tendencon oni ne povas ignori.

Solvi tiujn problemojn estas ne facile. Junuloj estas ĝenerale malriĉaj, vizo-problemo ekzistas, studentoj havas nur kvar jarojn por agadi, kaj kiam ili elklaras, libera tempo mankas al ili. Estas notinde, ke en tia situacio KAEM decidis doni subvencion al du partoprenantoj el Vjetnamio kaj Barato (bedaŭrinde tiu projekto ne realiĝis).

Amano Yayoi
prezidanto

de Japana Esperanto-Junularo

Ni festivalu!

Dum la semajnfino 16–18 jan okazis en Wedgwood Memorial College, Barlaston, Britio, la ĉiujara evento *Ni festivalu!* La celo de la aranĝo estas kunigi grupetojn kun diversaj interesoj, por ke ili ĝuu “Esperantujon”. Ĉi-jare okazis la tria sesio de “Drondo” (demokrata diskutrondo), denove gvidata de Derek Tatton; estraranoj de JEB aferkunsidis (kaj intertempe partoprenis en Drondo); gvidaj membroj de EAB profitis la okazon por fari asocian laboron; kaj ĉefe, kiel ĉiam dum tiu ĉi evento, jam la dek-kvinan *Ni teatrumu!* gvidis la konata dramverkisto, Paul Gubbins, ĉi-jare emfazante komediojn.

Teatro-ŝatantoj kunvenis por informiĝi pri originalaj Esperantaj teatraĵoj, por voĉlegi, rolludi, aktore trejniĝi laŭ sperta instruo de aktoro Collin Simmonds... por ĝui la dramajn eblecojn de la lingvo. Ŝajne ĉiu jaro estas nun por esperantistoj jubilea — kaj ne mankis jubileoj en la dram-programo: du verkoj fontis el la gravega kolekto *Virino ĉe la landlimo* (eldonita en 1959) de d-rino Marjorie Boulton, nome *Provludo en la klubejo* kaj *La sonĝo de la kursgvidanto*; kaj eĉ centjara verko ankoraŭ sukcesis distri — *Ĉu Pumpilurbo havu pumpilon?* prezentis temojn aktualajn en 1909, multaj el kiuj daŭre aktualas (ekz. virinaj rajtoj, respondeco de magistrato): la satiro bone efikas — en verko, kies lingvo estis tiam nur 22-jara! Malfacilaĵo tamen en tiu verko de Maréchal estas la foje paradoksa uzo de Esperanto en ne-Esperanta medio, dum la du Boulton-aĵoj pli kredeble okazas ĝuste tie kaj “malmalice” kritikis kelkajn malfort-aĵojn de ni gesamideanoj...

Festivala juvelo en la semajnfina programo, tute sendependa de la ceteraj eventoj, estis la sabatvespera prelego de Geoffrey Greatrex. Bonŝance la profesoro de kanada universitato pasigas iom da tempo en Anglio kaj povis ne nur partopreni *Ni teatrumu!* sed ankaŭ prezenti al la tuta ĉeestantaro iom mallongigitan version de prelego, kiun li prezentis dum la Roterdama IKU, pri la historiisto Prokopio de Cezareo. La prelego pri unuavide iom seka temo montrigis interesega, danke al la saĝa elekto de informoj kaj bildoj, kaj la vigla prezento de entuziasma, komunikema klerulo. La ovacion li plene meritis!

La kolegio en Barlastono bonvenigos esperantistojn denove dum la aŭgusta *Somera festivalo*.

Malcolm Jones

Lingvofestivalo en Loveno

Jam la duan fojon, sabate la 7an de februaro 2009 okazis en la flandra universitata urbo Loveno (Leuven) la Lingvofestivalo. Kvankam direktata al ne-esperantista publiko, ĝi estis organizita de la loka grupo *Esperanto 3000* kaj inter pli ol 200 vizitintoj arigis ankaŭ kelkdekonojn da esperantistoj. Kongrue kun la celoj de esperanto — esti dua lingvo por ĉiuj — la internacia lingvo servis en la fono kiel perilo, per kiu oni trovis multajn el la prelegantoj (inkluzive de kelkaj kiuj mem estis esperantistoj), sed dum la festivalo mem Esperanto estis prezentita egale kun 20 aliaj lingvoj. Tiel esperantistoj klare montris kiel esperanto kiel neŭtrala lingvo kapablas protekti kaj popularigi ĉiujn etnajn lingvojn sen diferenco.

Ĉi-jare la aranĝon gastigis la prestiĝa lovena Centro de Vivantaj Lingvoj. Pro ties subtenemo kaj subvencio de la urbo Loveno, kies urbestro eĉ propriniciate vizitis la aranĝon, la festivalo ĉi-foje estis por la partoprenantoj tute senpaga. En ses ĉambroj samtempe, dum kvar sinsekvaj sesioj, prezentiĝis en unuhoraj blokoj lingvoj kiel la rusa, la greka aŭ la irlanda, sed ne mankis ankaŭ pli “ekzotikaj” lingvoj kiel la ajmara aŭ la ĉiluba.

Krom la prelegoj mem, la aranĝon konsistigis ankaŭ enkoridara ekspozicio kun interesaj faktoj kaj specimenoj de la prezentataj lingvoj kaj surtabla ekspozicio de diverslingvaj libroj, ĉio samtempe ligita al la tiujara temo kiu estis “Paroli pri pasio — Paroli pri arto”, okaze de la antaŭvidata malfermo de nova muzearo en la centro de Loveno. Per standoj kun informiloj prezentiĝis kelkaj lokaj lingvolernejoj, ne mankis tamen ankaŭ esperantlingva libroservo, inkluzive de la nemalhaveblaj belgaj komiksoj en Esperanto, kiuj ankaŭ vekis atenton de la publiko.

Kiel unuafoja partopreninto kaj preleginto samtempe (pri la ĉeĥa lingvo), mi povis spekti la eventon de ambaŭ flankoj. Mirigis min, kiel glate iris la organizado, sub gvido de Marc Vanden Bempt, efektivigata de multaj sennomaj helpantoj el la vicoj de samideanoj kaj samfamilianoj kiuj prizorgis taskojn ekde ekipado de la festivalejo, tra akceptado de la alvenintoj komence kaj kolektado de la opinienketiloj fine, ĝis tiaj detaloj kiel disponigo de glaso da akvo por kiel eble plej komfortigi la prelegantojn.

Marek Blahuš



Ela Grabiec prezentas la polan lingvon (Fotis Marc Vanden Bempt)

Internacia Vintra Universitato

Internacia Kongresa Universitato (IKU) — serio de fakaj prelegoj, ĉiujare prezentataj dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK) — komenciĝis en 1951 kiel Internacia Somera Universitato (ISU). La nomon oni ŝanĝis en 1980, kiam la UK unuafoje okazis en la suda hemisfero. Kial do ne ekzistu ankaŭ *vintra* Universitato?

Serĉante taŭgajn formojn kaj kadron, mi pensis pri kunlaboro kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Jam en 1995 okazis en Tampere la unua komuna sesio, kaj de tiam preskaŭ ĉiujare okazis dum UK komuna AIS-UKU sesio, konsistanta el tri kursoj. Estus nature uzi similan kunlaboron por la vintra aranĝo, sed kiam kaj kie?

En la nordhemisfera somero UK servas kiel organiza kadro por IKU. Vintre ekzistas pluraj tradiciaj tutsemajnaj Esperanto-renkontiĝoj dum la novjaro, kiuj povus servi kiel taŭga kadro por la vintra universitato. Mi elektis la Internacian Festivalon (IF), kies riĉa kleriga programo plej taŭgas al tiuspeca aranĝo.

Tiel naskiĝis la Internacia Vintra Universitato antaŭ unu jaro kadre de IF en Düsseldorf, laŭ formato simila al la “komuna sesio” de AIS kaj IKU dum UK: studsesio de AIS konsistanta el tri kursoj. Fine de mia kurso (pri ekstertera vivo kaj la planedo Marso) okazis ekzameno, kaj ĉ. 20 sukcesis kaj ricevis oficialajn AIS-atestojn en solena ceremonio kiu okazis... dum la silvestra balo.

Sekve de la sukceso de la unua IVU, okazis la nunjara IVU-2, denove kadre de IF, samloke kiel pasintjare, en la junulargastejo en Düsseldorf. La elekto de temoj estis varia: Renato Corsetti prelegis pri lingvistikaj observoj pri Esperanto, Eugen Macko pri naciaj ideologioj en Mezeŭropo, kaj mi pri la temo “Teleskopoj”, okaze de la 400-jara datreveno de la invento de la astronomia teleskopoj. La kurso pri teleskopoj inkludis ankaŭ praktikan parton, en kiu la partoprenantoj kunmetis veran teleskopon kaj uzis ĝin (dum la silvestra balo) por observi stelojn.

13 interesatoj plenumis ekzamenon kaj ricevis atestojn de AIS en ceremonio kadre de la Armena vespero. Estis simbolo, ke ties organizantoj, Elena kaj Jasmin Arakelian, havas la saman familinomon kiel la fama armena astronomo, je kies nomo nomiĝas pluraj galaksioj.

La tria IVU okazos en la venontjara IF en Bavario.

Amri Wandel



Amri Wandel kaj IVU domis al IF galaksian dimension.



La dua sesio en UAM

Daŭras la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, Pollando.

La nova grupo, kiu altiris partoprenantojn el foraj landoj, kiel Brazilo, Usono kaj Grekio, en bona etoso travivis sian duan sesion (31 jan – 6 feb 2009) kaj la unuajn ekzamenojn. Vizaj problemoj malhelpis, ke la du iranaj gestudentoj alvenu.

Vera Barandovská-Frank enkondukis la partoprenantojn al interlingvistiko; la pola literatura duopo — Lidia Liĝeza kaj Tomasz Chmielik — analizis la esperanto-literaturon de la dua periodo; Michael Farris klarigis la bazajn nociojn de morfologio kaj sintakso per diverslingvaj ekzemploj; Ilona Koutny diskutis kun la gestudentoj pri tiklaj problemoj de esperanto-morfologio, kiel radikarkaraktero.

La komuna vespero kun partopreno de poznanaj esperantistoj ĉi-foje komenciĝis per prelego de Josip Pleadin. Post la sesio okazis unutaga ekskurso al Toruń.

Ilona Koutny

Claude Piron ne malaperis!



Esperanto-Grupo Claude Piron fondiĝis omaĝe al tiu eminenta esperantisto. La sidejo de la grupo estas ĉe la strato Anhemi 197, kvartalo Irajá, Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo.

Jam du grupoj da lernantoj, entute 35, lernis Esperanton per la lernolibro de la instruisto Jair Salles, krome per videoj kaj aliaj aŭdividaj rimedoj. En marto 2009 komenciĝos nova baza kurso gvidota de Marly Freitas. La lecionoj okazos unufoje semajne, merkrede.

✉ marlyfs@terra.com.br.

Marly Freitas

Verda Stelo kantas dum 25 jaroj

La koruso *Verda Stelo* estis kreita de Pedro Vilaroig kaj Juan Carlos Ruiz en la jaro 1984 ĉe la Madrida Esperanto-Liceo, kun la celo krei novan koncepton de muzika ludado. La koruso komencis kanti en Esperanto, unue en malgrandaj esperantistaj kunvenoj, iom post iom etendante siajn ludadojn al pli ampleksa spaco. Ĝi riĉigis sian repertuaron per folkloro kaj klasikaĵoj en aliaj lingvoj, cele al aŭdaca kaj ampleksa formo de arta ludado. Ĝia repertuaro en Esperanto estas multnombra, en kiu elstaras *Ave Maria* komponita de Pedro Vilaroig.

En 1993 okaze de la Universala Kongreso de Esperanto ĝi prezentis, en la Muzika Palaco de Valencio, la kantaton en Esperanto *La profil' de viaj spuroj*, komponita, surbaze de la teksto de Miguel Fernández, fare de ĝia direktoro kaj fondinto Pedro Vilaroig, akompanata de la Simfonia Orkestro de Valencio. La koruso *Verda Stelo* estas membro de la Korusa Federacio de Madrido kaj partoprenas en ĝia aktivado.

En 1987 estiĝis la orkestro *Verda Stelo*, kiu koncertis kaj akompanis la koruson dum kvin jaroj.

Nun la koruso, direktata de Laura Carballo, havas ĉirkaŭ tridek gekantistojn kaj faras siajn kantoprovojn en la preĝejo San Francisco el Grande de Madrido. En ĉi preĝejo ĝi partoprenis en kelkaj elsendoj de la Hispana Televido. Ĝia partopreno estas petata por ĉiaspecaj prezentadoj, konkursoj (Habaneras de Torrevieja), recitaloj en privataj centroj, akademaj eventoj, kulturcentroj, geedziĝoj, kongresoj, omaĝoj, Nacia Aŭditorio, Teatro *Monumental*, ktp.

11 jan 2009 ĝi aperis en la programo *Conciertos* de la dua kanalo de la Hispana Televido, en kiu ĝi partoprenis en la prezento de la “zarzuela” *Viva la Verberna* de Luis Aguilé.

Augusto Casquero

Esperanto en Kaliningrado

La duan februaran dimanĉon en la Marista kulturdomo okazis jarkunveno de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU), kiu traktis la pasintjaran aktivadon kaj voĉdone daŭrigis por unu jaron la mandaton de la gvidorgano.

Estis prezentitaj someraj aranĝoj okazontaj en Pollando, en kiuj partoprenos lokaj aktivuloj. La 150-jara jubileo de Zamenhof estas bona preteksto por intensigi la informadon. Ideo pri omaĝa kunveno, eventuale en la pollanda konsulejo, trovis subtenon de KREUanoj.

La sekretario de la Internacia Foto-konkurso de *La Ondo* anoncis la rezulton kaj enmanigis la diplomon de la laŭreato al Olga Ŝipovalenko (vd. la suban foton). Fine, oni tostis je prospero de la Esperanta afero, frandis bongustaĵojn kaj amike interbabilis.

Halina Gorecka



Foto de Aleksej Korjenkov

Dum 60 jaroj inter fervojistoj

Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA) eldonis sian ĝisdatigitan historion okaze de la 60a “naskiĝdatreveno” de la asocio en 2008. En du kajeroj oni povas legi pri ĝia aktivado en Danio kaj internacie dum ĉi tiuj jaroj. Danaj fervojistoj estis inter la pioniroj, kiam ekstis organizita fervojista esperantista laboro, kaj la rakontoj pri la multaj bravaj homoj povas daŭre inspiri.

DEFA apartenas al la internacia organizo IFEF. IFEF organizas ĉiujare ekde 1948 Internacian Fervojistan Kongreson, kaj la dana asocio kvinfoje aranĝis ĝin — la unuan en 1948 kaj poste en 1958, 1973, 1985 kaj 1998. Estas interese legi pri la preparlaboroj kaj eventoj, kiuj ja multe faciligis teknike kaj ŝanĝiĝis dum tiu periodo.

La historio haveblas ĉe la sekretario Lene Niemann (Hovedvagsstræde 9E, 1, DK-3000 Helsingør, ✉ Niemann@kabelmail.dk), kaj legeblas en la hejmapaĝo: www.jernbanesperanto.dk.

Jan Niemann

Sveda Renkontiĝo en bela naturo

22–24 maj 2009 en popolaltlernejo Fornby, en Dalekarlio, 230 km nordokcidente de Stokholmo okazos specialaj aranĝoj kiel: 1. Esperanto Eksprese: rapidkurso por akompanantoj aŭ eĉ partoprenantoj. 2. Infanejo por gefiloj, genepoj aŭ geamikoj de ili. Sperta gvidantino ludas kun ili kaj instruas al ili kantojn. 3. Tuttaga ekskurso. Unue al la mondfama kuprominejo en Falun, kiu estas unu el la svedaj mondheredaĵoj. Due al la subĉiela muziko-kaj-ope-ro-scenejo *Dalhalla*, kiu estas iama kalkŝtonminejo. 4. Paul Gubbins, lektoro ĉe la brita universitato de Manchester, prezentos propran teatraĵon. Krome li prelegos pri projekto *Springboard to languages* (lingvolanĉilo), kiel fari por allogi junulojn por lerni fremdajn lingvojn helpe de Esperanto. 5. Promenoj en la bela ĉirkaŭaĵo. 6. Jarkunvenoj de diversaj E-organizaĵoj. 7. Samideanoj distros nin per sia muziko.

Eksterlandaj partoprenantoj havos rabatitan kotizon.

✉ Sveda Esperanto-Federacio, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, Svedio,

✉ sefkongr09@esperanto.se

<http://www.esperanto.se/esperantistoj/sef/>

Humura literaturo en Esperanto

Populara hungara kanzono aludas rendezuon en “la kondoros-an Chardon”, kaj laŭdire, ĉiuj hungaroj konas la esprimon, eĉ ne sciante kie tiu “albergo” kuŝas (sud-oriente de Hungario) kaj ke ĝi plu ekzistas. Venu malkovri tiun lokon, kiu estos la konferencejo de la venonta IEK (Internacia Esperanto Konferenco, 18-24 jul 2009), des pli ke la temo tute certe allogos vin: “Humura literaturo en Esperanto”.

Matene prelegos Josef Dörr, Lena Karpunina, David Kelso, Ĵak Le Puil, Franz-Georg kaj Rita Rössler, László I. Tóth kaj aliaj. Paralele funkcios Esperanto-kurso por geknaboj. Posttagmeze vi povos ripozi en famaj kuracbanejoj, promeni tra la kamparo, deproksime sperti la vivon en tradicia kampara medio. Vi eĉ povos tranokti ĉe la loĝantaro mem.

Matene prelegos Josef Dörr, Lena Karpunina, David Kelso, Ĵak Le Puil, Franz-Georg kaj Rita Rössler, László I. Tóth kaj aliaj. Paralele funkcios Esperanto-kurso por geknaboj. Posttagmeze vi povos ripozi en famaj kuracbanejoj, promeni tra la kamparo, deproksime sperti la vivon en tradicia kampara medio. Vi eĉ povos tranokti ĉe la loĝantaro mem.

Pál Kozsuch (Vasut u 3, HU-5553 Kondoros, Hungario, ✉ pauljuno@freemail.hu) prizorgas la renkontiĝon, kiu ĉiam disvolviĝas en familia etoso.

Je la fino estos voĉdonita la OSIEK-premio 2009.

Anne Jausions

SES kun dua lernu!-renkontiĝo

SES-2009 okazos 10–18 jul 2009 kun jam la dua fizika renkontiĝo de *lernu!*-kreantoj, helpantoj kaj uzantoj. La aranĝon gastigas urbeto Modra-Harmónia (Slovakio), 30 km de Bratislava.

La programo konsistas el kelkaj partoj. Antaŭtagmeze: instruado de Esperanto. Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp. Vespere: nacia kaj internacia vesperoj, koncertoj, filmspektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en kvar grupoj, laŭ la lingvo-nivelo. Fine la partoprenintoj ricevos atestojn pri 26-hora kurso laŭ la niveloj de nova eŭropa referencakadro pri lingvoinstruado de A1 ĝis C1.

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos kerna *lernu!*-teamo. Eblos ĉeesti prelegojn pri *lernu.net*, pri la traduksistemo de la paĝaro k.s., eblos diskuti, proponi ŝanĝojn rilate al la paĝaro.

Por vojaĝemuloj ni proponas trise-majnan vojaĝ-kombinon: SES (Slovakio), IJK (Ĉeĥio), UK (Pollando).

Nova eblo ĉi-jare! Por instruemuloj, kiuj jam bone regas la lingvon, ni proponas seminarion *Flugiloj de malfacila vento*, realigotan kunlabore kun ILEI.

Por pli da informoj vidu rete: http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php aŭ informiĝu ĉe la ĉef-organizanto: ✉ petro@ikso.net

Peter Baláz

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09

HUMURA LITERATURO EN
ESPERANTO



Informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org

Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu
OSIEK: <http://osiek.org>

Unufraze

★ La ĉefministro de Malsupra Saksio (Niedersachsen) Christian Wulff akceptis esti alta protektanto de la Germana E-Kongreso k Eŭropa E-Kongreso, kiuj okazos 28 maj — 3 jun 2009 en Herzberg. (ICH)

★ 18 dec 2008 Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio estis oficiale registrita en Litovio; ĝi estas la unua internacia organizaĵo, kun sia jura sidejo en Litovio. (Vytautas Ŝilas)

★ Kleriga Ministerio de Slovenio akceptis la projekton pri eksperimenta enkonduko de Eo en du lastaj jaroj de infanĝardeno k en unuaj tri de elementa lernejo por 200 infanoj en 8 grupoj en Maribor. (*Eŭropa Bulteno*)

★ Asocio de Beninaj E-istoj konvinkis la responsulojn pri edukado en la departementoj de Mono k Couffo enkonduki Eon kiel nedevigan lernobjekton en kelkaj lernejoj. (Landa Agado)

★ 7 feb en la kulturcentro *Beseda* en Moravské Budjovice (Ĉeĥio) ekfunkciis ekspozicio pri Komenio k Eo. (ĈEARetkomunikoj)

★ La urba konsilantaro de Osijek (Kroatio) donis la nomon *Esperanto* al strateto en la distrikto Malsupra Urbo. (*Tempo*)

★ En januaro komenciĝis E-kurso en la Stokholma Universitato kun ĉ. 20 kursoj; instruas Sonja Petrović-Lundberg. (Hokan Lundberg)

★ Je 13 feb 2009 al la 94a UK en Bjali-stoko aliĝis 1275 personoj el 59 landoj: 219 el Pollando, 191 el Francio, 114 el Germanio, 112 el Japanio, 53 el Nederlando, 46 el Italio, 45 el Ĉeĥio. (uea.org)

★ 9 jan 2009 la Plenum-Komitato de SAT publikigis proteston kontraŭ la perforto de Israelo en Gazao k kontraŭ la batalmetodo de Hamas. (*Sennaciulo*)

★ En februaro k marto la membroj de la Akademio de Eo voĉdonas pri la nova landnoma listo, proponita de la sekcio pri ĝenerala vortaro gvidata de Bertilo Wennergren. (HeKo)

★ Post la eksiĝo de Ernesta Pieĉiutė ekde 26 jan 2009 kiel la sekretario de Litova E-Asocio en Kaŭno oficas Egidijus Skarelis. (Povilas Jegorovas)

★ Kadre de la Transjara Renkontiĝo en Kameoka (Japanio), Yas Kawamura sukcesis en diplomiga ekzameno k iĝis la 71a diplomita Cseh-instruisto aktiva nuntempe. (Landa Agado)

★ 11 feb la socia E-retejo *Klaku.net* ĉesis funkcii, ĉar, laŭ ĝia fondintoj, tro malmultaj retanoj uzis ĝin por popularigi tekstojn. (*Libera Folio*)

Kongresa projekto 2014

En 1914 la grandaj Eŭropaj regnoj deklaris al si reciproke militon, kiu fariĝis monda. Por esperantistoj des pli gravas tiu evento, ke ĝi sufokis la Universalan Kongreson antaŭviditan en Parizo, kiu tuj devis disiĝi. Ankaŭ pro la milito Zamenhof mortis sen realigi la projekton por kiu li plej vigle klopodis ekde 1913: organizi kongreson de “neŭtrale-homa religio”, al kiu estu proponita lia Deklaracio pri homaranismo.



1914 estis grava frapo por esperanto, sufiĉe vigla tamen por ne pereji, sed frapo eĉ pli grava por homaranismo, tiam eĉ ne naskiĝinta. Kongreso celanta homaran fratecon por centjara jubileo de 1914 havus duoblan signifon: por ĉiuj pac-amantoj ĝi signifus progreson de la homaro per signifa inverso de la deklaroj: anstataŭ milito, paco kaj frateco; anstataŭ regnestroj, konsciaj civitanoj. Sed krom

tiu ĝenerala signifo, por esperantistoj ĝi enhavus iun plusan valoron: honoro iniciati la renkonton, efektivigo de la revo Zamenhofs kunveni homojn de diversaj lingvoj, gentoj, religioj kaj mondkonceptoj por al si reciproke deklari fratecon, kaj fine gvida rolo, ne nur lingvaterene per uzado de la plej kontentiga solvo, sed ankaŭ translingve se ni kapablos en modernaj vortoj enblovi la spiron de la Zamenhofs frateco.

Jen la esenco de mia projekto, por kies preparo ne troas ses jaroj, ĉar venas multaj demandoj.

— Kio daŭre konservindas el la homaranisma projekto Zamenhofs?

— Kiun vorton oni uzu por nomi la renkonton? Ĉu kongreso de frateco? de paco? de solidareco? Aŭ alimaniere?

— Kiom da homoj venus? Ĉu dudek? Ĉu kvinmil?

— Kie oni organizu tion? Ĉu en pli-malpli simbola urbo? Kiu?

— Kiom da tempo daŭru la aranĝo? Kun kiu programo?

— Ĉu deklaron oni proponu? Kian? Ĉu oni simple fidu la partoprenantojn por ĉiutaga “strebo al homeco”, kiu per radiado iom post iom modifus la socion? Jen utopio, certe, sed historion faras utopiistoj: Gandhi, Nelson Mandela, Martin Luther King...

— Resume, kiel tiu aranĝo ne dronu en sensekva forgeso?

— Ĉu oni uzu aliajn lingvojn ol esperanto? Jam en 1913 Zamenhof antaŭvidis tiun hipotezon.

— Kiu preparu la aranĝon? Ĉu nur esperantistoj? Kaj inter ili, kiuj?

— Ĉu oni preferu unu grandan kunvenon aŭ plurajn aranĝojn disajn?

La 14a de decembro 2008 grupeto kunvenis en KCE, Ĉaŭdefono, Svislando por studi la aferon kaj diskuti respondojn al la supraj demandoj, kaj fine decidis prepari la projekton per stud-seminario dediĉita al homaranismo, en KCE mem, inter la 17a kaj la 21a de aŭgusto 2009.

Partopreno de ĉiu al tiu renkonto estos bonvena, sed ankaŭ propraj iniciatoj celantaj igi la jaron 2014 jaro de frateco.

Kontaktoj: ✉ François Degoul, 54 rue des Caillots, FR-93100 Montreuil frdegoul@wanadoo.fr

François Degoul

Kia Esperanto 2009?

De biologia diverseco al kultura unueco, ĉu?

La homa neceso-bezono pri baza bonstato-bonfarto kaj la homa avido-manio pri profitoj kaj lukso ĉiujare kaŭzas negativan bilancon koncerne materiajn kaj sentoksigajn resursojn kaj kapablojn de la biosfero.

Ankaŭ kulturo, ankaŭ komunikado, respondecas pri daŭropoveca traktado de la strukturo kaj dinamiko de la vivo sur nia Planedo.

La konsumklaso de la evoluitaj landoj uzas ĉefe monon kaj la anglan por detrui la biosferon kaj per tio la eblojn de ontaj homaj generacioj. Esperanto nek alestu nek ĝisrestu en la kun- kaj post-ondoj de ĉi procezo!

La nuntempaj krizoj pri justeco kaj la medio estas antagonymaj en la senco, ke pli da justeco en la mondo kondukas al malpli da medio kaj inverse. Ununura solvo de ĉi dilemo estas la koncepto de daŭropoveco, kiu signifas

— ke la evoluitaj landoj devas rezigni pri grava parto de sia bonstato-bonfarto,

— kaj ke la evoluintaj landoj devas zorgi pri propra bonstato-bonfarto, kiu estas eltenebla de la biosfero.

Esperanto pro si mem estas daŭropoveca:

— ĝi reduktas porsociajn riskojn per demokratia dulingveco,

— kaj ĝi reduktas pormediajn riskojn per maksimuma maldisipo de materialaj resursoj.

Neniu alia trajto de Esperanto pli multe valoras! **Esperanto estas ekologie daŭropoveca komunikilo.**

Ĉiuj oficialaj organizaĵoj de la esperanto-movado ĝis nun neglektas tion. La “lingvokaĉe” memreferenca pensado-ago de ĉi organizaĵoj kunkulpadas en la pereigo de la biosfero... Ni ne dubu pri tio!

Kulturo ne povas senkulpigi mediodetruon. Komunikado ne povas senkulpigi mediodetruon.

Estas postulo de la biosfero forme de ĝia pensa viva materio, kiu estas la “homo sapiens sapiens”, ke organizaĵoj kiel UEA, SAT, EEU k.a. klare identiĝu ekologie kaj oficiale agadu laŭeble porvive futurinde.

Se la materiala kaj kultura evoluigo de la homaro al ĉiam pli universala unueco signifas la detruon de la biologia diverseco, ĝi ne valoras — negrave kiulingve ĝi realiĝas...

Tio ankaŭ signifas, ke finfine estus pli bona ajna **ne-esperanta** solvo de la monda lingvoproblemo, se ĉi solvo estus la pli daŭropoveca.

Ĉi-sence oni komprenu la frazon: “Esperanto — Internacia Lingvo por Monda Demokratio kaj Sana Medio”.

Wolfgang Günther

29 dec 2008 forpasis en Šiauliai (Litovio)

profesoro Vytautas Sirtautas (1921–2008)

filologo, poligloto, profesoro de la pedagogia instituto (poste: universitato) de Šiauliai, aŭtoro de 23 libroj kaj ĉ. 300 artikoloj. Esperantisto ekde 1934, li instruis Esperanton, kiel dekano de la filologia fakultato helpis esperantistojn en la pedagogia instituto, kaj dediĉis al Esperanto duonpaĝon en sia universitata lernolibro de lingvistiko (1995).

5 jan 2009 forpasis en Šiauliai

Vincas Barcys (1922–2009)

juristo kaj amatora muzikisto, esperantisto ekde 1987, aktiva instruanto de Esperanto en Šiauliai, Joniškis, Radviliškis, tradukanto de litovaj kantoj en Esperanton, laŭreato de *Muzoj*.

Ni funebras kaj kondolencas.

Centjariĝo en Ĉeĥio

30 jan 2009 en la kinejo *Metro* en la urbo Prostějov (Ĉeĥio) estis instalita Esperanta ekspozicio okaze de la centjariĝo de la esperantista klubo en ĉi tiu urbo.

7 feb 2009 okazis en Prostějov renkontiĝo okaze de la jubileo kun 60 partoprenantoj el Ĉeĥio kaj Slovakio. Matene la prezidantino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio Jana Melicháková malkovris memortabulon ĉe la baza lernejo en la strato Palackého, kie la klubo estis fondita en la jaro 1909.

Poste oni vizitis Esperanto-monumenton en la parko Kolář. Post ekskurso tra la urbocentro kaj tagmanĝo en restoracio ĉiuj trarigardis la urbodomon. Sekvis vizito de la Esperanta klubejo kaj trarigardo de la ekspozicio en la kinejo *Metro*. Fine en la Domo de servoj en la strato Olomoucká okazis kultura programo kaj danca vespero kun riĉa tombolo.

Jaroslav Liška

Centjara datreveno de Ivo Lapenna

Du gravaj datrevenoj en 2009: D-ro L. L. Zamenhof (150-jara) kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna (100-jara).

La **Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna**, prezidanto: Prof. D-ro Carlo Minnaja (red. de *Eseoj memore al Ivo Lapenna*. 29 konataj aŭtoroj kontribuis al tiu ĉi ĉarma kaj interesa 417-paĝa verko), kaj la **Fondaĵo Ivo Lapenna**, prezidanto: D-ro Klaŭs Perko, instigas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, E-klubojn, E-kunvenojn k.s. ĉie en la mondo celebri la du gigantojn per multaj ekspozicioj, prelegoj kaj artikoloj en la gazetaro pri ilia enigma, eminenta kaj elstara laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto.

Ni invitas vin senpage utiligi la abundan materialon de nia hejmapaĝo: dokumentoj, paroladoj, fotoj ktp. (bv. indiki la fonton). Jen la adreso: www.ivolapenna.org

Birthe Lapenna

6 feb 2009 en *The Times Literary Supplement* — prestiĝa literatura revuo al la londona tagĵurnalo *Times* — aperis recenzo de John Wells pri la enciklopedio de Geoffrey Sutton, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, aperinta pasint-jare ĉe *Mondial* en Novjorko. La recenzo estas pozitiva; ĝi informas la ĝeneralan publikon pri la disponeblo kaj kvalito de la originala Esperanta literaturo. Wells afable disponigis en *Facebook* bildan version de sia recenzoteksto. (Laŭ informoj de István Ertl kaj Probal Dasgupta)

A long kolego

JOHN WELLS

Geoffrey Sutton
CONCISE ENCYCLOPEDIA OF
THE ORIGINAL LITERATURE OF
ESPERANTO
745pp. New York: Mondial, 2008.
\$78.95/€90.00

On a private scale when they wish their governments would do so on a national and international scale. On the political scene, Esperanto also has its mystics, those excited—particularly under Hitler and Stalin, but also under Mao—for their international contacts and support of ideas unacceptable to national governments.

The rise of English as an international language, and indeed the continued international use of other “languages of wider contact” such as Spanish, French, Portuguese, Russian, Arabic, and Chinese, such as in their sphere of influence, means that the prospects for the general adoption of Esperanto as the preferred language for international contacts are looking pretty dim. Nonetheless, there is and remains a substantial body of speakers (claimed by supporters to be in the millions but more realistically estimated at perhaps 100,000) who not only use the language but who buy and read books written in it, or now-and-then do the equivalent online.

One criticism of Esperanto often made is that it has no culture, no literature. Geoffrey Sutton’s book, however, offers numerous ways to refuting such suggestions. It offers individual entries on some 300 authors and their work. Sutton’s division of Esperanto’s literary history into five main periods seems about right. The first period, which Sutton calls “Primitive Romanticism and the Establishment of Style”, was one of naive enthusiasm. Zamenhof’s “early” work consisted on translating works by famous authors (Möller, Goethe, Schiller, Gogol, Andersen, etc.) to introduce Esperanto to the public. It was not, as Sutton claims, the first Esperanto work, but rather the first published original poetry and prose of some note. It was between the First and Second World Wars that creative writing in Esperanto really



A poster for the annual congress of Semtanea Asocio Tutmonda, the World Non-national Association, 1930.

took off. Sutton’s second period, “Mature Romanticism and a Literary Flowering” (1921–30), saw the appearance of a generation of poets, notably the Hungarian Károlyi and Bagby, the Russian Mikhalok, and the Japanese Kenji Onaka. They explored the latest possibilities of the language, developing vocabulary, word forms and word order in ways that were slightly shocking at the time but are now taken for granted. The third, “Parasitism and the Coming of Age” (1931–51), built on this, and consolidated Károlyi’s status as the most accomplished Esperanto poet of the early twentieth century. If Károlyi was regarded by readers included to serious literature, the writer who most deflated the general Esperanto-using public was Raymond Schwab, a bank official from Alsace, born of French-speaking parents but educated in Germany. He was the master of the Esperanto pun. Despite Zamenhof’s wish to avoid homophony, the distinctive system of agglutinative affixes, producing a work morphology more similar to that of Japanese or Zulu than to that of any European language, means that possible homophones abound, and Schwab exploited this. So *kolego* “colleague” can be reinterpreted as *kolek* “cock”

pho the agglutinative suffix *-eg-* allowing such whimsies as an amusingly apt *kolleko* “year” which also has homonyms of Esperanto as an elementary stage!

Why is the puzzle never solved? Because it always is in his language. The title itself of Schwab’s verse collection, *La Ĉiujlingva* “The All-Slang” could be interpreted instead as *La Ĉiujlingva* “A shop of the lowest rank”. But punning was only one aspect of Schwab’s linguistic dexterity and skill in light verse. The result reads as if you are invited to the language group called Esperanto, the first thing you will see is a Schwab poem of modesty about the Esperanto movement, its first stanza reads: “Venla veni sur la brusto / mi palas por la mato / Mi ne estas purigita / ĉi estas mi esperantista”. (A green star on my lapel / somewhat falling with me / I’m not a cleaner, I’m an Esperantist... / I’m distinguished by two British words, the English *Majorie* Bushon and the Scottish *William Auld*. Bushon’s writing ranges from heart-wrenchingly honest and moving personal verse, into an unusually strong social conscience, to metaphors for advanced learners, via light verse about cats, Chinese food and the problems of everyday life. She has also produced a series of lightly regarded college textbooks in English, among them *The Anatomy of Poetry* and *The Anatomy of Prose*. Auld’s seven free-chapter poem *La Junaĵo* “The Childhood” is regarded by many as the single most outstanding work in Esperanto literature. As Sutton puts it, Auld “sets out his world-view, tackling nothing less than the history of the universe and the conditions of mankind in space and time. His vision could perhaps best be described as social progressive atheism. For him, religion is not that, but a human world-view of man’s highest moral merit of man’s highest moral merit. I read *La Junaĵo* Rava as an undergraduate, it was overlaid by the breadth and depth of this vision. It has left a lasting imprint on my own view of the world. I am sure it has on many other readers, too. And that is no mean achievement for something written in a language that started as an East European school-teacher’s idiosyncratic project.



E@I prezentas

Flugiloj de malfacila vento

Flugiloj de malfacila vento (FMV) estas gramatika kaj metodika seminario, lanĉita de ILEI en kunlaboro kun E@I, kies primara celo estas prepari kompetentajn junajn instruistojn de Esperanto. Kromaj celoj estas altigi la nivelon de junaj Esperanto-parolantoj kaj plibonigi la gvidadon kaj organizon de Esperanto-kursoj. Ĝuste pro tiu celo la seminario okazas dum pluraj junularaj aranĝoj kaj konsistas el du partoj: gramatika, kies celo estas sistemigi kaj profundigi gramatikajn sciojn de Esperanto, kaj metodika, kiu provizas lernantojn je la plej gravaj instrumentoj de Esperanto.

Ĉiu intereso rajtas partopreni seminarion. La seminario estas senpaga, tamen postulas nepran membrecon en ILEI: nemembroj de ILEI, kiuj volas partopreni iun seminarion, povas surloke membriĝi.

La nomo de la seminario estas aludo al verso el *La Espero* de Zamenhof. La ŝanĝo de la vorto “facila” al “malfacila” implicas, ke Esperanto (kaj instruado de ĝi) ne ĉiam estas tiel facila, kiel oni imagas tion.

La teamo de la projekto klarigis la elektitan nomon de la agado en decembro 2003:

Hodiaŭ ekzistas pluraj aferoj kiuj malfaciligas instruadon de Esperanto, aparte al kaj fare de gejunuloj. Ekzemple:

- malalta lingvonivelo ĉe multaj junuloj,
 - malmulte da junaj Esperanto-instruantoj ekzistas,
 - malabundans materialo taŭga por junuloj,
 - malestas eblecoj peti monon de eksteraj fondaĵoj por Esperanto-instruado kaj
 - malfacilas trovi interesigantojn (almenaŭ en la okcidento) kaj / aŭ instigi komencintojn daŭrigi la lernadon.
- Alivorte: ni laboras en MALfacila vento...

FMV bonvenigas junajn instruemulojn, kiuj havas fortan deziron lanĉi kurson de Esperanto, sed bezonas profundigi siajn teoriajn sciojn pri instruado kaj ricevi praktikajn konsilojn kaj sperton.

La unua FMV okazis en Kovrov (Ruslando) kadre de IJK_2004. Ekde tiam la seminario regule okazas ĉe diversaj grandaj Esperanto-aranĝoj kun junulara partopreno.

Inter la plej sentebaj rezultoj de la *Flugiloj de Malfacila Vento* estas la *Manlibro pri instruado de Esperanto* — sub la redaktora gvido de Katalin Kováts kontribuis 13 aŭtoroj. La libron, kies kvara eldono aperos ĉi-somere, samkaj komencajn seminariojn subtenis finance Esperantist Studies Foundation.

Por povi efike okazigi la seminariojn aperis en jaro 2006 subprojekto *Gvidu la “Flugilojn!”* — kiu pretigas jam relative spertajn esperantistojn flu gvidi la FMV-seminariojn tra la mondo. Por la “Gvidu”-kandidatoj ekzistas sufiĉe severaj kondiĉoj. Tiuj devas esti gejunuloj kun pedagogia aŭ/kaj lingvistika klero, kun instruista sperto, libere parolantaj en Esperanto kaj pretaj dediĉi sin por gvidado de FMV en esperantistaj aranĝoj.

En 2009 FMV revigliĝas. Estas planataj pluraj seminarioj kaj kreo de aparta rtpaĝo. Plia celo por proksimaj jaroj estas disvastigi *Flugilojn* al aliaj kontinentoj (ĝis nun ĉiuj okazis en Eŭropo).

Eblecon partopreni en Flugiloj-seminario havos ankaŭ ĉeestontoj de SES (Somera Esperanto-Studado), kiun kunorganizas E@I kaj SKEJ kun faka kontribuo de ILEI.

flugiloj@gmail.com

Peter Baláž,
E@I-kunordiganto



LA LINGVO

Se temas pri famuloj, oni kutime parolas pri iliaj “vivo, verkoj kaj ideoj”. Sed en zamenhofologio ni apartigu la lingvan kreadon de Zamenhof disde lia literatura kaj ideologia verkaro.

La lingva kreado de Zamenhof estas bone studita en multaj fakaj verkoj kaj en konferencaj kontribuoj. La *Unua Libro*, la unuaj vortaroj, la *Fundamento* kaj la *Lingvaj Respondoj* estis multfoje reeldonitaj kaj trastuditaj. Preskaŭ ĉiu serioza esperantologia studo pri iu ajn parto de la lingvo Esperanto — fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj frazeologio — traktas detale la Zamenhofan uzadon. Multaj ekzemploj Zamenhofaj estas en (N)PIV, PAG kaj en PMEG. En la jubilea jaro 1987 aperis grava, sed nesufiĉe atentita, pli ol 500-paĝa ekzemplaro²⁵, kompilita de Riĥej Nomura. Plia dezirindaĵo estas eldono de Zamenhofa konkordanco — sliparo de William Bailey, konservata en la arkivo de Reinhard Haupenthal. Eble la plej grava inter la “klasikaj” studoj pri la Zamenhofa lingvokreado restas *Lingvo kaj vivo*²⁶ de Gaston Waringhien.

Estas malfacile por mi — ne lingvisto, sed ĵurnalisto — proponi taskojn en la lingvistika branĉo de zamenhofologio. Mi kuraĝas menci i nur kelkajn temojn.

Zamenhof ne formulis la principon de sia vortelektado, krom plej ĝenerale, kiel la principon de internacieco. Ne li, sed la Amerika Filozofia Societo proponis la liston de ses kontrol-lingvoj (angla, franca, germana, hispana, itala, rusa), kiujn oni esploru por trovi laŭeble internaciajn vortojn por internacia

Aktualaj problemoj de zamenhofologio

La dua parto de la eseoj de Aleksander Korĵenkov

lingvo. Ĝin adoptis, kiel la principon DEFIRS, la idistoj kaj la Akademio de Idiom Neutral (ĝi aldonis ankaŭ la latinan).

La Universala Vortaro (UV, 1894), kiu poste iĝis parto de la Fundamento, havas tradukojn en la franca, angla, germana, rusa kaj pola. Sed la kvin tradukoj de Zamenhof ne klarigas, ekzemple, la devenon de “seĝo”, kiu laŭ UV estas “chaise”, “seat”, “Stuhl”, “стул”, “krzesło”. Ĉar Zamenhof donis en UV “chaise” sed ne “siège”, kiu ja estas la prototipo de seĝo, la Akademio de Esperanto en 1922 enmetis “siège” en la francan parton de UV.

Proksima al ĉi tiu estas la demando pri la maniero, en kiu Zamenhof adaptis nacilingvajjn vortojn al Esperanto. Waringhien skizis en *Lingvo kaj vivo* (La *Fundamento de Esperanto*). 1. *Historia aspekto*) kvin principojn de tiu adaptado, sed necesas pli da ekzemploj, kiuj laŭas kaj mallaŭas ĉi tiujn principojn.

En la sama studo Waringhien menciis ankaŭ la semantikon. Preninte vorton el la franca, Zamenhof ofte donis al ĝi la semantikon de la respektiva vorto rusa. Michel Duc Goninaz en *Slava influo en Esperanto*²⁷ demonstris ĉi tion per ekzemplo de la vorto “paroli”, kiu estas sence pli proksima al la rusa “говорить” ol al la franca “parle” kiu do estas la grafika, sed ne la semantika fonto de “paroli”. Ankaŭ ĉi tie necesas pli da ekzemploj por vidi pli klare ĉi tiun tendencon.

La lasta temo, delikata por la lingve sentemaj esperantistoj, estas reformado. Zamenhof plurfoje proponis reformi Esperanton, sed liaj reformproponoj ne

estis akceptitaj. Laste, jam en 1915, post 28-jara funkciado de Esperanto, li retorike demandis²⁸:

Kial ni konservu en nia lingvo tiujn kelkajn bagatelojn, kiuj estas simple frukto de teoria nerimarkeco, kiuj ĉiujn nin konstante ĝenas kaj tamen povas esti tre facile forigataj?

kaj alvokis “unu fojon por ĉiam tre atente kaj detale revizii nian tutan lingvon”, ĉar

Se ni, esperantistoj, la solaj kompetentuloj en la aferoj de nia lingvo, ne solvos tiun demandon konforme al nia sperto kaj al nia profunda amo al la afero, tiam povos okazi, ke iam la registaroj, decidinte akcepti nian lingvon, transdonos ĝian korektadon al personoj, kiuj havos famajn nomojn, sed absolutan senspertecon en nia afero, kaj ĉi tiuj agos simile al la fama fabla urso, kiu, intencante mortigi muŝon sur la frunto de sia gvidanto, frakasos lian kapon.

Necesas studi ĉiun el la Zamenhofaj reform-proponoj, precipe tiujn, kiujn li plurfoje proponis, kaj resumi ilin. Ĝis nun ĉi tion faris idistoj por pravigi sian lingvon per la aŭtoritato de Zamenhof. Nun, kiam Ido ne plu estas reala rivalo por Esperanto, ni mem povas malkaŝe sistemigi kaj montri ankaŭ al la esperantistoj la reform-ideojn de la iniciatoro de la lingvo kun komentoj lingvistikaj kaj historiaj.

Daŭrigota

Referencoj

25. *Zamenhofa ekzemplaro*: Esprimoj cititaj el la ĉefaj verkoj de D-ro L.L. Zamenhof / Komp. Riĥej Nomura. Nagoya: Nagoya Esperanto-Centro, 1987.

26. Waringhien G. *Lingvo kaj vivo*: Esperantologiaj eseoj. La Laguna: J. Régulo, 1959.

27. Дюк Гониназ М. *Славянское влияние в эсперанто* // Проблемы международного вспомогательного языка. М.: Наука, 1991. С. 117–126.

28. [Zamenhof L.] *Historia manuskripto de Zamenhof* // Esperanto. 1971, №12. P. 202–203.

Napoleono atakas Pruslandon

Lime de la 18a kaj 19a jarcentoj la Sankta Roma Imperio de la Germana Nacio troviĝis en la stato de profunda politika dispeciĝo. Ĝin konsistigis pli ol 300 feŭdaj posedaĵoj: reĝlandoj, princ-landoj, episkopejoj kaj aliaj ŝtat(et)oj kun siaj propraj interesoj.

La nova pruslanda reĝo Frederiko Vilhelmo III (1770–1840, reĝo ekde 1797) daŭrigis la strebadon de Frederiko II al hegemonio de Pruslando, sentante kontraŭstaron de la Habsburgoj. Frederiko Vilhelmo estis malforta, malkuraĝa kaj hezitema ŝtatestro. Li promesis helpon al Aŭstrio, sed nenion faris post la invado de Napoleono en 1805, esperante pro la neŭtraleco al Francio akiri Hanovron kaj aliajn nordajn teritoriojn. Tiun rekompencan li ja ricevis, sed nur kontraŭ rezigno pri Ansbach kaj aliaj lokoj.

Kiam Napoleono venkis la aŭstrian kaj ruslandan armeojn ĉe Austerlitz, jam ne eblis ignori alvokojn de la aliancanoj. La pruslanda armeo havis frakasan malvenkon ĉe Jena (14 okt 1806). 27 okt 1806 Napoleono eniris Berlinon. La pruslanda reĝo fuĝis al Kenigsbergo. En oktobro-novembro 1806 pruslandaj garnizonoj en Erfurt, Lübeck, Stettin, Magdeburg kaj aliaj kapitulacis sen batalo. Historiistoj nomis tion “malgloro de la prusaj fortikaĵoj”. Tio elvokis malestimon de Napoleono, ĉar neniu ŝtato, krom Pruslando, malvenkis senbatala.

Frederiko Vilhelmo petegis Napoleonon ĉesigi la militon, sed Napoleono iĝis pli postulema, kaj la milito daŭris. Pruslandon apogis Ruslando, kiu sendis du armeojn por malhelpi al la francoj transiri Vistulon. Pluraj persistaj bataloj signis la vintron 1806/07. Inter ili la batalo ĉe Preußisch Eylau (nun Bagrationovsk en Kaliningrada regiono), la unua en kiu Napoleono ne akiris la kutiman brillan sukceson: grandegajn perdojn havis ambaŭ militantaj flankoj. Post la okupo de Dancigo kaj malvenko de la ruslanda armeo apud Friedland (nun Pravdinsk en Kaliningrada regiono), la Napoleona armeo okupis Kenigsbergon.

Reĝino Luiza

Ankoraŭ kiel juna kronpirnco, Frederiko Vilhelmo partoprenis en la milito kontraŭ la revolucia Francio. Dum tiuj kampanjoj li konatiĝis kun la princino Luise von Meclenberg-Strelitz kaj enamiĝis al ŝi. Fine de 1793 Luiza iĝis lia edzino.

Ŝin distingis mirinda beleco, saĝeco kaj afableco. Ŝi restas la plej fama virino de Pruslando. Ŝin respektis ĉiuj loĝantoj

Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (13)

de Halina Gorecka



de Kenigsbergo kaj nomis ŝin “spirita mentoro” kaj idealo de virineco.

Iĝinte reĝino, Luiza baldaŭ allogis la korojn de siaj regatoj, ŝi aliĝis al la partio de reformoj. Ŝi akompanis sian edzon, kiam la reĝo aŭtune 1806 ekiris militen. Ŝi aranĝis kontraŭnapoleonajn manifestaciojn. Post la malvenkoj, por entuziasmiĝi la armeon ŝi venis al la militistaro surĉevale en la armea uniformo. Napoleono ordonis publikigi en la francaj ĵurnaloj artikolojn, kiuj kun malica ironio kaj sarkasmo traktis la reĝinon Luiza.

Post la batalo ĉe Jena la reĝa kortego fuĝis al la Orienta Pruslando. 8 dec 1806 Luiza venis al Kenigsbergo, sed por nelonge. Baldaŭ, en januaro 1807, grave malsana, ŝi daŭrigis sian fuĝadon for de Napoleono laŭ la Kurŝa terlanga al Memel (nun Klaipėda en Litovio).

La packontrakto de Tilsit

Okupinte la tutan Pruslandon, Napoleono minacis la limon de Ruslando. Aleksandro I, la imperiestro de Ruslando, devis konsenti pri pactraktado en Tilsit (nun Sovetsk en Kaliningrada regiono). Sen havi armeon kaj aliancanojn, ankaŭ Frederiko Vilhelmo sekvis lian ekzemplon. La franca kaj ruslanda imperiestroj renkontiĝis meze de la rivero Nemano, sur flosa en pavilono inter kvar okuloj. Nur sekvatage en la dua renkontiĝo partoprenis la pruslanda reĝo, kiun Napoleono traktis humilige, dirinte al tiu nur kelkajn vortojn, sen inviti lin al tagmanĝo de la imperiestroj.

Napoleono deziris likvidi Pruslandon kiel memstaran ŝtaton kaj proponis al

Aleksandro dividi ĝin inter Francio kaj Ruslando. La pruslanda reĝo estis konsternita kaj petis helpon de Luiza.

Luiza haste venis al Tilsit por peti Napoleonon pri indulgo. Luiza kaj Napoleono longe interparolis sen atestantoj. Sed ŝia misio restis sensukcesa, kvankam Napoleono admiris ŝian belecon: “Mi aŭdis, ke Vi estas belega inter la reĝinoj, sed mi ne scias, ke Vi estas belega inter la virinoj”.

Post la 12-taga traktado, 9 jul 1807 estis subskribita la packontrakto de Tilsit. Nur danke al la persisto de Aleksandro, kiu tre simpatiis kun Luiza, Frederiko Vilhelmo konservis la “Oldan Prusujon”, Pomerion, Brandenburgion kaj Silezion. Ĉiuj aliaj provincoj estis forprenitaj. Pruslando devis pagi grandegan kontribuon. La sekvaj kvin jaroj estis malgaja tempo por la pruslanda reĝo kaj por ĉiuj pruslandaj patriotoj, precipe post la morto de la reĝino Luiza (1810).

En 1807–1812 en Pruslando estis efektivigitaj administraj, sociaj, agraraj kaj armeaj reformoj, kiujn iniciatis ministro Stein, generalo Scharnhorst, generalo-feldmarŝalo Gneisenau kaj grafo Gardenberg.

En 1812, antaŭ la invado en Ruslandon, la franca imperiestro devigis Aŭstrion kaj Pruslandon subskribi kontrakton, laŭ kiu tiuj ŝtatoj devis disponigi al Francio armeajn kontingentojn. En la Orienta Prusujo koncentriĝis potencaj trupoj de la franca armeo por la ekspedicio al Ruslando.

12–17 jun 1812 Napoleono troviĝis en Kenigsbergo; li ekzamenis la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon, inspektis siajn taĉmentojn (divizion *Juna gvardio*, la nederlandan kaj vestfalian regimentojn), kiuj iros al Ruslando. Interese, ke dum la inspektado li rajdas ĉevalon kun la nomo *Moskva*. Pruslando mobilizis por la milito 21 mil personojn, kiuj konsistigis t.n. prusan divizion.

Informoj pri la pereco de la Napoleona armeo en Ruslando elvokis patriotan entuziasmon en Pruslando. En marto 1813 Frederiko Vilhelmo publikigis alvokon *Al mia popolo*, per kiu li alvokis al liberiga milito kontraŭ la francaj okupantoj. Kiel ano de la kontraŭnapoleona alianco, la pruslanda armeo en 1814 eniris Parizon.

Daŭrigota



Adjektivo kaj participo

de **Geraldo Mattos**

Vere mi estas mania homo, sed unu el miaj tiaj malsanoj ŝajnas al mi treege malagrabla, ĉar ĝi puŝas min al eseetoj pri niaj participoj, kaj miajn okulojn ĝi cele gvidas al tiuj okazoj kaj lokoj, kiujn mia Esperanto trovas eraraj.

Se mi kaptas revuon aŭ libron kaj ilin mi komencas foliumi kaj legi, ne nur mistere, sed eĉ misgrunde, tuj aperas al miaj sorĉitaj okuloj kaj al mia mistikla cerbo unu post alia de la sama revuo aŭ de la sama libro... participo, laŭ mi en nekonvena formo!

La lasta viktimo frapita de mi — tute senvole kaj tuj postpente! — estas unu el la revuoj, kiujn mi plej estimas pro ĝiaj temaj kaj lokaj diverseco kaj bonelekteco: *La Ondo de Esperanto*. Cetero, mi amas la lagojn, la riverojn kaj la marojn... Ĝuste en la spaca mezo de la novembro revuo, paĝoj 14 kaj 15, miaj scivolaj fingroj plukis po unu erara elekto de participoj en ĝiaj kvar kolumnoj:

1-a kolumno, sub *Kontraŭ anglalingva imperialismo* [4-a desupra teksta linio]:

“Watson notis, ke probable EU baldaŭ havos plian lingvon, la turkan, post kiam estos *atingita* fina akordo inter la du komunumoj de la insulo Cipro”. [atingata]

2-a kolumno, sub *Helpi junajn afrikajn esperantistojn* [meza linio de la 4-a §]:

“Dum mia unusemajna restado en Lokossa mi aĉetis keston de sapo kaj transdonis ĝin kun *restinta* mono al la direktoro de la orfejo, li kaj la infanoj ege dankas al ĉiuj!” [restanta]

3-a kolumno, sub *Kial ni ne aĉetas librojn* [unua frazo de la numero 5]:

“La plej grava punkto, pri kiu ĉiuj *debatintoj* konsentis: por intensigi la aĉetadon kaj legadon de libroj en Esperanto, necesas urĝe plibonigi la lingvonivelon de la esperantistaro”. [debatantoj]

4-a kolumno, sub *Vikipedio por vi* [unua frazo de la lasta §]:

“Kvankam kunlabori al Vikipedio estas relative facile, *interesitoj* ĉefe komence havas multajn demandojn kaj hezitas kontribui”. [interesatoj]

La paradiza peko ĉe la participoj estas ĉiam la sama pomo: la pasinteco ĉiam estas pli bona ol la estanteco... Ne nur tamen la odoro de la pomo allogas niajn senzorgajn samideanojn, sed unualoke iliaj instruaj libroj kaj plej ofte iliaj denaskaj lingvoj.

La instruaj libroj kulpas de tio, ke ili prezentas la participojn sinonimaj al adjektivaj frazoj, kiaj ili rarissime estas: -anta: kiu -as / -inta: kiu -is / -onta: kiu -os / -ata: kiun -as / -ita: kiun -is / -ota: kiun -os. Ili ĝustas, se nur ni parolas pri la nuna momento!..

Fakte, participo estas simpla adjektivo, kiu ĉiam konservas sian sencon, sendepende de la tempo de la verbo, en kies frazo ĝi aperas:

-anta kaj -ata: dum iu [io] -as / -is / -os iun [ion]

-inta kaj -ita: post ol iu [io] -as / -is / -os iun [ion]

-onta kaj -ota: antaŭ ol iu [io] -as / -is / -os iun [ion]

Niaj denaskaj lingvoj — kaj mi mem ne tute liberiĝis de la portugala! — ordinare havas unu solan particon kun skandalaj polisemioj [itala kaj portugala lingvoj]:

1 Se temas pri transiraj agoverboj, la participo estas estinta kaj pasiva: *marcato* / *marcado* [markita].

2 Se temas pri transiraj statoverboj, la participo estas estanta kaj pasiva: *amato* / *amado* [amata].

3 Se temas pri netransiraj verboj, la participo estas estinta kaj aktiva: *andato* / *andado* [irinta].

4 La sama formo povas esti jen aktiva jen pasiva: *aver amato* / *ter amado* [amanta] / *essere amato* / *ser amado* [amata].

Se niaj gepatraj lingvoj influas nin, la rezulto estas io babela...

Esperanto estas regula kaj senescepta lingvo, kaj tial ĝia precipa regulo estas la sekvanta: kio validas por unu, tio validas por ĉiu. El tio sekvas:

Se *mortinta*, *mortinte* kaj *mortinto* estas senescepte **post morti** kaj *portita*, *portite* kaj *portito* estas senescepte **post porti**, ni devas konkludi, ke la estinta participo ĉiam indikas la tempon post -i, kaj neniam la tempon dum -i!..

Niaj neprudentaj samideanoj simple sekvas la suprajn anomaliajn sencojn, kaj uzas unu solan estintan particon en aktiva kaj pasiva formoj:

1 ... post kiam estos *atingita*. Tiaj frazoj kun -os -ita nepre indikas staton, sed la kunteksto aludas ne la finon de la stato, sed la finon de la ago: post la ago venas stato, sed kio diable venas post la stato krom nenia plua stato? Rezulto de la instruo:

... kiu atingis: atingita.

2 ... kun *restinta* mono. Post la resto estas nenia resto... Rezulto de etnolingva imito.

3 ... ĉiuj *debatintoj* konsentis. Debatintoj ne konsentas, sed nur debatantoj. Rezulto de etnolingva imito, sed ni devas elekti inter debatantoj, debatintoj, debatontoj....

4 ... *interesitoj* ĉefe komence havas. Al interesitoj nenio plu interesas, sed nur al interesatoj. Rezulto de etnolingva imito, sed vortara skandalo, ĉar donas la estintan particon, kiu vere sencas post la interesiĝo, sekve ne plu interesata: Benson [angla], Grosjean-Maupin kaj aliaj [franca], Krause [tri germanaj], Le Puil, Danvy kaj aliaj [franca], Minnaja [itala], Rhodes [angla]. Aliaj savas nian verdan mondon: Almeida [portugala] Bendix [dana], Costa [brazila], Gutiérrez [hispana], Honfan [ĉina], Waringhien [franca].

Ni tamen havas ses participojn kun iliaj dek ok formoj!..

Lingvo Internacia

En aŭgusto 1895 Zamenhof anoncis, ke la *Esperantisto* ne plu aperos. Tiu-tempe sveda studento Valdemar Langlet (1872–1960) kun amiko-esperantisto vizitis Ruslandon. En Odeso li prilaboris la situacion kun ruslandano Vladimir Gernet (1870–1929), kaj ili decidis pri eldonado de *Lingvo Internacia* (LI) — “monata gazeto por la lingvo Esperanto”. Laŭ ilia interkonsento ĝin eldonis la esperantista klubo en Upsalo (Svedio), kaj Gernet estis ĝia redaktoro kaj financa direktoro.

La provnumero aperis en decembro 1895. Laŭ la redakcia ĉefartikolo ĝia celo estis “vastigado kaj prilaborado de la lingvo internacia Esperanto”. Ke prilaborado ne estis reformado, kiu antaŭ unu jaro skismigis la esperantistaron, klarigas la redakcio, alvokante ĉiujn amikojn de Esperanto kune “ellabori bonan kaj detalan gramatikon de la lingvo Esperanto en la lingvo Esperanto” kaj helpi kreadon de faka leksiko, dum la reformadon oni rezervis al “la tutmonda kongreso, aŭ internacia societo de homoj, sufiĉe spertaj por tia laboro”.

Foliumante la malnovajn jarkolektojn 1895–1902, oni tamen sentas, ke la deklaritaj celoj apenaŭ estis realigataj, kaj ke en la revuo, krom la intencitaj prilingvaj artikoloj, plejparte aperis primovadaj informoj kaj beletraĵ(et)oj.

LI principe malsamis de la *Esperantisto*, en kiu Zamenhof multe verkis mem kaj redaktis ĉiujn alies tekstojn, kaj tiel, malgraŭ eventuala malkontento de kelkaj aŭtoroj, la legantoj ricevis



gazeton kun laŭeble modela lingvaĵo. Gernet estis pli tolerema, kaj la tekstoj en la unuaj jarkolektoj montras, ke tiam eĉ konataj aŭtoroj nesufiĉe lerte uzadis la lingvon.

Kvankam Zamenhof de tempo al tempo kontribuis al LI, li apenaŭ influis la enhavon kaj la eldon-politikon de la revuo, kaj en №6–7 (1896) li klarigis, ke li malofte kunlaboras en LI ne pro malkontento pri ĝi, sed ĉar li volas, ke Esperanto ne plu dependu de la iniciatoro, kaj ke “la senpersoneco kaj memstareco de nia afero ĉiam pli kaj pli fortiĝu”.

Du problemoj premis la novan revuon. Unue, la presprovaĵoj estis sendataj el Upsalo al Odeso, kaj post la korektado Gernet resendis ilin al Svedio. Pro tio la revuo ofte malfruis, kaj la aktualeco de la novaĵoj estis dubinda. Due, la abonantoj estis tro malmultaj. En la unua

eldonjaro (1896) estis 517 abonantoj, el kiuj pli ol duono (266) en Ruslando, 104 en Francio, 52 en Svedio kaj 40 en Germanio. Sekvajare estis 526 abonantoj (320 en Ruslando), kaj 486 en 1898.

Por ĝustatempigi la eldonadon en decembro 1897 la redaktoro de LI iĝis upsalano Paul Nylén (1870–1958), sed la revuo plu malfruis. Zamenhof, malkontenta pro la malfruado, ŝanĝis sian sintenon kaj 17 mar 1898 skribis al Nylén pri sia preteco transpreni la redaktadon kaj eldonadon de LI, sed 30 apr 1898 li skribis, ke tio “estas al li malpermesita” (Ĉi tiujn kontraŭdirajn leterojn komentas Ludovikito en *Historieto de Esperanto*, p. 170–171), kaj Nylén plu redaktis ĝin.

Dum la unua jarduono 1899 LI tute ne aperis kaj, finfine, ekde 1900 la presadon surprizis Pál Lengyel (1868–1932) en Hungario. Nylén redaktis ĝin ĝis septembro 1901, kiam Lengyel iĝis redaktoro-eldonanto-presanto-administranto de LI, kiu tiujare havis nur 338 abonantojn.

Sed jam en januaro 1902 la redaktadon akceptis juna parizano Paul Fruictier (1879–1947). Tio estis bona solvo, kaj la jarkolekto 1902 estis multe pli bona ol la antaŭaj: ekaperis regule ilustraĵoj, la enpaĝigo iĝis pli legebla, kaj laŭ la eldonanto (kiu ne publikigis la statistikon) la abonantaro ekkreskis.

En septembro 1904 Pál Lengyel ekloĝis en Parizo, kaj 12 feb 1905 en Parizo fondiĝis Presa Esperantista Societo (PSE) — la unua esperantista entrepreno en la mondo kun prezidanto Théophile Cart (1855–1931), komerca direktoro Fruictier kaj teknika direktoro Lengyel. Dum 1905–1906 LI aperis du fojojn monate, kaj poste ĝi ĉiumonat-iĝis. Fruictier restis redaktoro de LI ĝis 1907, kiam Cart ekredaktis ĝin.

La jaroj 1907–1914 estis la plej prosperaj por LI, kiu antaŭe estis en la ombro de *L’Espérantiste* de Louis de Beaufront. Ĝi aperis regule kaj bonkvalite, kun enhavo serioza, kaj kun direkto klare profilita kontraŭ de Beaufront kaj idistoj, kontraŭ Bourlet kaj *Hachette*, kontraŭ Sebert kaj la Centra Officejo, por la klasika Esperanto. Iom post iom LI iĝis la plej grava esperantista informgazeto (*La Revuo* estis la ĉefa literatura) laŭrajte portanta subtitolon “Centra Organo de la Esperantistoj”, kun interesaj redakciaj artikoloj de Cart.

La mondmilito metis la finon al *Lingvo Internacia* da kiu aperis entute 252 kajeroj sur 6574 paĝoj.

Th. Cart

Aleksander Korĵenkov

LA ESPERANTISTA POPOLO

Ĉu la Esperantistaro estas popolo? — Jes, certe!

Ĉu la Esperantistaro estas nacio? — Ne, certe ne!

Tiuj, kiuj klopodus por doni al ĝi oficialan reprezentantaron, registaron kaj leĝaron, por fari el ĝi apartan nacion, kun ĝiaj estroj, partioj kaj klientaroj, sukcesinte, mortigos Esperanton.

Se, tion drante, mi eraras, oni montru al mi mian eraron ĝentile kaj per argumentoj.

* * *

Esperanto mem estas lingvo, kaj nur lingvo.

Ĝi devas penetri ĉien, en ĉiujn rondojn, en ĉiujn naciojn, en ĉiujn ekleziojn. Ĝi devas esti en nia internacia kaj eĉ nacia vivo, kiel la ruĝa fadeno, kiu kuras tra la ŝnuregoj de la angla ŝiparo.

Kiam la lingvo kaj per ĝi, konscie aŭ senkonscie, penetros ĉien ĝia spirito, ĝia interna ideo.

Sed tiu ĉi, — se mi eraras, oni ree pardonu, — des pli facile, des pli certe ĉien penetros, ju malpli ni parolos pri ĝi kaj simple propagandos la lingvon.

Ĝin ni ĉien semu kaj dissemu. Tia tasko sufiĉas al nia nuna forto.

Pri la estontaj kaj gravaj fruktoj de nia laborado ni ne dubu.

La venko de Esperanto estos pli ol nur venko de lingvo!

Lingvo Internacia, 1910, №5, p. 193–194.

Poemoj de Jevgenij Baratynskij



Jevgenij Abrámovič Baratýnskij (ankaŭ: Boratynskij) naskiĝis 19 feb 1800 en poldevena nobela familio en Tambova gubernio. En 1812 li eklernis en la Peterburga oficira lernejo, sed en 1816 li estis eksigita pro ŝtelo, kaj al li estis malpermesita ŝtata servo. Nur en 1819 li ekservis kiel simpla soldato en Peterburgo, kaj en 1820 kiel suboficiro li estis sendita por kvin jaroj al garnizono en Finnlando. Oficiriginte en 1825, li sekvajare edziĝis kaj forlasis armeon.

Baratynskij verkis precipe elegiojn. Ili estis unuafoje presitaj en 1819. Li novisme enmetis en siajn elegiojn psikologion kaj filozofion. Puŝkin alte taksis lian *Konfeson* (1823) la plej bona rusa elegio kaj ŝatis ankaŭ lian finnan poemon *Eda* (1824). Grandan popularecon havis ankaŭ *Festenoj* (1820), *Balo* (1828, ĝi aperis en *Du versrakontoj* kune kun *Grafo Nulin* de Puŝkin) kaj *Ciganino* (1831). En la 1830aj jaroj la verkoj de Baratynskij iĝis ĉiam pli mornaj kaj senesperaj. En 1827 kaj en 1835 aperis liaj poemaroj sub la modesta titolo *Versoj*, kaj en 1842 estis eldonita lia tria poemaro *Krepuskoj*.

Aŭtune 1843 Baratynskij forveturis al Francio, kaj poste al Italio. En Napolo li subite malsaniĝis kaj mortis 29 jun 1844.

*Disiĝis ni; la ĉarmo kaj admiro
Nur efemeris en la vivo-bol';
Por mi neniam sonos am-parol',
Kaj ne varmigis min la ama spiro!
Mi ĉion havis, perdis en moment';
Ekdormis mi... tuj sonĝo amoplena
Degelis! Sole nun amaro ĝena
Al mi postrestis de feliĉa sent'.*

<1820>

*Komence penso trovas sin
En densaj vortoj de poemo —
Malklara, kiel virgulin'
Por la monduma neglektemo;
Kaj poste, pli kuraĝa jam,
Edifas ŝi kun preciozo,
En bril' de ĉiaspeca fam' —
Edzino, sperta pri la am',
En romanista flua prozo;
Plu, babilema oldulin',
Venanta kun aroga ŝriko,
Ŝi en gazeta polemiko
Banalon semas laŭ rutin'.*

<1837>

*Konstante en purpur' kaj oro,
En belo de pasi-torent',
Vi ne suspiras kun doloro
Pri perdo de juneca sent'.
Ol jun-gracioj vi pli ĉarmas!
Pli pompas sunsubir', ol tag'!
Pli korpas vi, pli arde varmas
Ol vivaj, brila ombr-imag'!*

<1840>

PLENDO

*Plago de bela somero, muŝo veinda, vi kial
Flirtas, por mia sufer', jen ĉe l' vizaĝ', jen ĉe l' man'?'
Kiu pikilon provizis, kapablan ĉesigi arbitre
Penson en fluga liber', kison de arda amor'?'
Vi el pacema revanto, el fil' de eŭropa droloto
Faras la sciton sovaĝan, streban al mort' de rival'.*

<1841>

Gastante en la urbeto de sia infan-aĝo, Kedrin senzorge iradis de la patrina domo al la domoj de la frato, fratino, avino, ĝojis pro renkontoj, agrablaj konversacioj, pro vorkumo kaj bierumo kun la frato kaj malnovaj lernejoj amikoj. Kaj neatendite li eksentis ion konfuzan, antaŭe nekonatan.

Li sentis, ke baldaŭ, baldaŭ eble hodiaŭ, eble morgaŭ okazos io neevitebla. Li ne povis antaŭvidi kio estos: malsano, malfeliĉo aŭ eĉ morto aŭ male: amoro, riĉeco, feliĉo. Pli verŝajne okazos io terura. Se tiel, la teruron devas ne vidi antaŭ ĉio la patrino kaj la gefratoj, kompreneble. Do, kvankam estis vespero, li devis urĝe forveturi.

Li kunmetis sian sakon kaj longe ne povis decidi, kion li diru al la patrino. Nu, kion: devo, laboro, cirkonstancoj. Li finfine eliris el la patra ĉambro kie li gastante lokiĝis kaj, brakuminte la patrinon, diris al ŝi:

— Mi devas forveturi, panjo. Oni vokas min al la laboro.

— Ĉu? — panjo levis la okulvitrojn sur la frunton. — Kiel? Ĉu vi ricevis malbonan telegramon?

— Ho, panjo, kia stranga vi estas. En nia tempo oni ne bezonas telegramojn.

— Ha, oni telefonis do. Ĉu grandaj malagrabloj?

— Ne, ne maltrankviliĝu. Nenio serioza, sed mi devas esti tie.

— Ho, kia do estas via laboro!.. Knabo mia... Vi devis pli frue diri. Mi kuirus ovojn...

— Eh, panjo. Vi kuiris al mi ovojn kaj fritis kotletojn antaŭ kvardek jaroj... Bonega estis la tempo... Sed, panjo, nun homoj vivas alie. Vi vidas, kun kia sako mi vojaĝas: razilo kaj paro de tolaĵoj. Vojaĝanto nun bezonas nur monon, kaj li ĉion havas. Sed monon mi havas, vi ja scias, ke mi laboras kiel azeno.

Kedrin volis senzorge ridegi, sed la rido estis negaja.

— Ho, fileto... Nu, se oni atendas vin... Kion fari? Ni volis ankoraŭ aranĝi adiaŭan vesperon.

— Panjo, mi tre volus tian vesperon, sed... Komprenu.

— Nu, knabo mia, kion fari? Se vi tiel ŝatas vian laboron... Vi povus ja ĵeti la laboron kaj ripozi, vi estas jam sufiĉe aĝa. Valeĉjo kaj Klanjo eĉ ne laboras jam, sed vi estas la plej aĝa... Nur al ni du Dio donis la sorton vivi longe kaj feliĉe.

Io devas okazi

Originala novelo de Miĥail Korotkov



— Jes, panjo, feliĉe, ni vivos ekskluzive feliĉe. — Li ankoraŭfoje provis senzorge ekridi. — Pro tio bonvolu ne ĝeni vin...

* * *

Nun, paŝante laŭ nezorgata stepa vojo, li rememoris la vortojn de la patrino pri la feliĉa vivo. Pri tiu enigma fenomeno sciis ĉiuj parencoj, sed laŭtvoĉe paroli pri ĝi estis nekonvene.

Tiu fenomeno koncernis nur lin, la patrino kaj la avino. Kedrin estis 65-jara, sed lia reala aĝo estis ĉirkaŭ tri-dek jaroj. Li ne nur aspektis 30-jara, tia li estis ankaŭ anime. La patrino estis 84-jara, sed ĉiuj gekonatoj taksis ŝian aĝon je 45–50 jaroj. Same ŝi ankaŭ sentis sin. La avino estis jam 106-jara, sed ankoraŭ plena je vivo, havis sufiĉe da fortoj mastrumi dometon, ĝardenon, kokidojn. Ŝi aspektis pli maljuna ol ŝia filino, sed ne tre.

Tio estis agrabla donaco de la naturo: kiu ne volus esti eterne juna? Kiom da eminentaj pensuloj serĉis en la mezepoko la filozofan ŝtonon, kiom forbrulis sur ŝtiparoj de l' inkvizicio aŭ mortis en mizero kaj maljuneco. Tiom da vivoj senrezulte pereis — sed la ŝtono malestas.

Kedrin ricevis ĝin dum la naskiĝo senpage, uzis ĝin kaj silente ĝojis.

Jes, silente. En la juneco li ne sciis pri tiu donaco, li rimarkis ke li heredas la avino kaj la patrino antaŭ eble dek kvin jaroj, kiam liaj gefratoj, amikoj kaj konatoj neatendite maljuniĝis. Ĉu povis Kedrin fanfaroni per sia juneco? Komprenoble, li povis ĝui ĝin nur silente.

Kaj la ĝojo post jaroj fariĝis malgajo. Kedrin restis juna, energia, plena de planoj por futuro, revoj, ŝatis vinon kaj virinojn, sed ĉirkaŭantaj lin homoj

maljuniĝis, fariĝis teduloj, enuigaj grumbluloj, ĉagreniĝis pro malbona sano, malgranda pensio, pro la nuntempa junularo, pro malestimaj gefiloj kaj genepoj. Interrilati kun ili estis ĉiam malpli interese; ili mire kaj malkomprenigardis lin, kiam li komencis paroli pri foraj landoj kaj planedoj, realaj vojaĝoj aŭ fantastaj flugoj, pri novaj eltrovoj en la scienco, pri novaj libroj, prozistoj kaj poetoj. Iom post iom ĉiuj kunuloj restis en la pasinteco.

Liaj pli junaj frato kaj fratino ŝajnis al li pli onklo kaj onklino. Iam li kun Valerio estis ardaĵ amantoj de la rusa vaporbanejo. Ĉi-somere en la banejo de Valerio eĉ betula bankvasto ne estis. “Eh, maljuneco, — plendis la frato, — betulo apud la banejo kreskas, sed mi ne havas fortojn leviĝi sur ĝin por pretigi bankvastojn. La dorso doloras, la gamboj doloras...” Kiam li maljuniĝis? Ŝajnas, antaŭnelonge ili duope vaporbanis sin laŭ ĉiuj reguloj: frapis unu la alian per bankvasto, poste kuŝis en neĝo, poste trinkis bieron...

La kuzo Georgo iel nerimarkite malaperis. Ŝajnas, antaŭ kelkaj jaroj ili ankoraŭ kune bonege diboĉis, sed ĉi-jare la patrino diris pri Georgo: “Ho, li jam delonge mortis. Mi telegrafis al vi, sed vi tiam en eksterlando estis...”

Li havis normalan familion: edzino, filo. Sed kiam ilia filo komencis aspekti kiel pli aĝa frato de la patro, kaj la edzino — kiel patrino de ambaŭ, la edzino ne eltenis mokajn ŝercojn de najbarinoj kaj foriris de Kedrin.

Maljuniĝis ankaŭ la tuta mondo ĉirkaŭ li. Li preskaŭ ĉiujare venis dum forpermeso en sian urbeton Istoki, vagadis en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, sed de jaro al jaro tio ĉi iĝis ĉiam pli malĝoja. Dum li restis juna, la ĉirkaŭa mondo

maljuniĝis. En la iam verdaj arbaroj kaj sur freŝaj herbejoj li renkontis ĉiujare pli kaj pli multe da mortaj arboj, sekiĝintaj fontoj, senakviĝintaj riveretoj kaj laĝetoj.

En la malnova parko, kie li unuafoje kisis knabinon, plimulto de arboj sekiĝis, oni elhakis la tutan parkon kaj plantis novan. La nova estis sur la sama loko, sed ĝi estis nekonata, fremda parko.

Apud Istoki estis lago, sur kies bordo li kun siaj nedisigeblaj amikoj Sergo kaj Petro sidadis dum kvietaj lunhelaj vesperoj. Ili sidadis ĝis meznokto aŭ eĉ pli malfrue, parolis pri futuro, pri la senco de l' vivo, kiel ili refaros ĉi mondon kiam iĝos plenaĝuloj. Nun la lago, iam grandega, malprofundiĝis, malpligrandiĝis preskaŭ duoble, ĝiaj bordoj kovriĝis per densejo de kano, la akvo verdiĝis.

Sergo estis talenta pentristo, partoprenis en multaj ekspozicioj de Japanio ĝis Usono. Sed lia pentrista kunularo vivis bohemie, senorde, ebrie, kaj Sergo forpasis antaŭ dudek jaroj. Ĉiam ironiema Petro verŝajne ekde la infanaĝo estis poeto kaj parodiisto, li ĉiam ridigis ilian malgrandan kompanion. Sed Petro delonge forveturis eksterlanden, kaj tie liaj spuroj perdiĝis.

La brilanta juna vivo de Kedrin fariĝis ĉiam pli kaj pli malplena. Iam li venis en la gepatran hejmon kaj povis pasigi la tutan forpermeson kun la patrino, gefratoj kaj lernejoj kunuloj, vagante en ĉirkaŭaĵoj de Istoki. Sed tiu ĉi mondo, amata en la infanaj kaj junaj jaroj, fojon post fojo aliĝis, kaj ne al plibono, jaron post jaro ĝi fariĝis pli fremda.

Li jam ne povis vivi en Istoki la tutan forpermeson monaton. Post unu

semajno lia angoro pro la aliiĝanta, maljuniĝanta mondo iĝis neeltenebla, kaj li trovis kialon forveturi. Same ankaŭ hodiaŭ, nur ĉi-foje aldoniĝis antaŭsento de io eksterordinara.

Li decidis forveturi tuj vespere, ne atendi morgaŭan matenan buson. Li iros piede ĝis la ĉefvojo, kaptos samvojan aŭton aŭ kamionon por atingi la fervojan stacion. En Istoki fervojo ne estis.

Irante preter la iam amata lago, sur kies bordo kreskis nun la nova parko, li atentis malnovan ventmuelejon. Li aŭdis kelkfoje, ke iu entreprenema homo aĉetis tiun muelejon, paginte ĝin kiel hejtlignon. Onidire li aranĝis en la muelejo originalan rusan tavernon, kiu estas tre vizitata de la urbeta junularo.

“Tie oni povas verŝajne drinketi kaj manĝi”, — pensis Kedrin kaj direktis sin al la taverno.

Ĝia interno estis vere pli ol originala. Kelkaj lignaj tabloj estis nefarbitaj, sed sufiĉe puraj. Apud la tabloj staris kamparanaj ĉaroj plenaj de pajlo, pajlo kuŝis ankaŭ sur la planko. Sur du muroj pendis krudaj vilaĝaj gobelinoj. Sur la tabloj staris argilaj potoj kaj argilaj teletoj kun sekala pano. La aero odoris per kvaso, fungoj, fenkolo, ajlo kaj deko da aliaj aromoj agrablaj por la rusa flarsento. Apud unu tablo sidis sur ĉaroj tri junuloj, trinkis bieron kaj nelaŭte interparolis.

Sed vere frapanta estis kelnerino. Kvankam ŝi estis en bunta rusa sarafano kaj blanka tuko, Kedrin tuj komprenis ke ŝi estas ne el ĉi tiu mondo. Kvazaŭ knabinon el bona inteligenta familio, kiu ŝatas la romanojn de Turgenev, la poemojn de Lermontov, la muzikon de Ĉajkovskij, oni enĵetis en vulgaran ebrian kompanion.

— Bonan vesperon, — ŝi modeste ridetis al Kedrin. — Sidiĝu kie al vi plaĉas, ni ĝoje gastigos vin. Jen la menuo.

— Ĉu oni ĉe vi sur ĉaroj sidas? — Kedrin ankaŭ ridetis al ŝi.

— Se vi tre volos, vi rajtas eĉ kuŝi sur pajlo, ĉe ni estas permesite.

Ŝi foriris kaj Kedrin kun intereso komencis legi la menuon. Ha, kelkaj specoj de vilaĝa vodko: kun aromoj de konjako, de rumo, de ĝino. Aha, oni sciopovas ja. Indas ĉion gustumi. Plu. Ĉio pure rusa: peklitaj fungoj, peklitaj kukumoj, malvarma kvasa supo, rostova fiŝsupo, pelmenoj*, flanoj, kuko. Bonege. Kedrin decidis, ke li ne simple drinketos kaj manĝos, li restos ĉi tie pli

longe. Ne pro vodko kaj la rusa kuirarto, sed pro la kelnerino. Kie ankoraŭ oni povas renkonti tian inspiritan vizaĝon? Neordinara junulino, paroli kun ŝi estos tre interese.

La kelnerino venis por mendo. Kedrin mendis, ne gravas kiun vodkon, kiujn manĝaĵojn. Dum ŝi forestis, Kedrin pripensis estontan konversacion. Do, nenian vulgarecon, banalecon, tiu junulino estas super tiu koto.

— Kiel vi nomiĝas? — demandis li kiam la kelnerino alportis pleton kun argilaj teleroj.

— Aliona, — ŝi modeste malleviis la okulojn.

— Ĉu? Kia rara kaj bela nomo.

— Tion mia paĉjo elpensis.

— Via patro estas poeto.

— Ne, li estis pentristo.

— Ĉu estis?

— Jes, li forpasis. Tute neolda estis.

— Sed kial forpasis?

— Pro troa amo al vodko, — suspiris ŝi.

“Jes, mi ne eraris, — pensis Kedrin. — Simpla kaj pura junulino. Certe ŝi ne estas kutima kelnerino, kapabla flirti kun la unua veninta kliento, ridegi je liaj vulgaraj ŝercoj, elteni liajn voluptajn altedojn. Ne, ŝi trovas sin ĉi tie okaze. Plej verŝajne cirkonstancoj aŭ?..”

— Aliona, ĉu vi ŝatas vian laboron?

— Pro kiu ĝojo? — Ŝi malgaje ridetis.

— Nu, tie ĉi estas tiel interese, rusa vilaĝa etoso.

— Interesa estis nur la unua tago, eble ankoraŭ la dua. Kiel mi komprenas, vi estas urbano, sed tie ĉi oni devas simple, — ŝi denove ridetis, — resti viva.

— Aha, vi ne revis do pri tiu ĉi laboro. Vi revis pri io alia, ĉu ne?

— Certe pri alia.

— Mi supozis tion. Aliona, mi vere estas el fora urbo, kaj al mi estas tre interese konversacii kun vi. Ŝajnas, vi estas rara junulino por Istoki. Eble vi estas nura tia en ĉi urbeto.

— Ankaŭ vi ŝajnas interesa homo. Vi verŝajne estas vojaĝanto kaj povas multe rakonti, — ŝi ekridetis. — Tien ĉi venas ja simplaj homoj, nu, tro simplaj. Ili babiladas pri nenio. La plej bona konversacio kun ili estas silento.

Kedrin estis frapita de la profundece de tiu penso. “La plej bona konversacio kun ili estas silento”. Ŝajnas, proksimume tiel sonas unu el postulatoj de zenbuddismo. Sed de kie ŝi povas en tiu ursangulo koni ion pri zenbuddanoj?

Kiom tiu knabino devis suferi pro aroganteco, malbona eduko de ŝia medio, ĝia idioteco, senkaŭza malico, pro vilaĝa senceremonieco, pro tiel nomata sankta simpleco, pro eterna malkompreno inter homoj pensantaj kaj stultuloj, ke ŝi memstare venis al la penso, al kiu buddanoj iris dum jarcentoj!

Tiumomente de la flanko de tri junuloj trinkantaj bieron aŭdiĝis nekontentaj elkrioj.

— He, Lenka! Muzikon! — kriis unu el junuloj.

Aliona foriris ŝalti magnetofonon, eksonis iu senenhava moderna popkanto. Ŝi revenis kaj sidiĝis kontraŭ Kedrin.

— Antaŭe ĉi tie sonis nur rusaj kantoj kaj romanoj, — ŝi sciigis. — Ili plej harmonias kun la ĉirkaŭumo de la dek naŭa jarcento. Sed poste vizitantoj postulis tiun bagatelaĵon, — ŝi montris al la magnetofono kaj ridetis kvazaŭ pardonpete.

— Do, Aliona, se via laboro ne urĝas vin, — Kedrin sidiĝis pli oportune sur la pajlo, — kaj se vi ne kontraŭas, ni parolu pri viaj iamaj revoj, nu, pri aliaj laboro kaj vivo, ne tiuj, — Kedrin ĉirkaŭmontris la ejon.

— Kial do la revoj devas esti iamaj? Kia vi estas! Ili estas nunaj.

Al Kedrin estis tre facile konversacii kun ŝi, kaj li sentis ke ankaŭ al ŝi tiu konversacio estas kiel ekspiro de freŝa aero.

— Bone, nunaj, do nunaj, — li aŭdeble ridetis al ŝi. — Sed en la infanaĝo vi ankaŭ pri io revis. Pri kio: ĉu pri kino kaj teatro aŭ pri vojaĝoj kaj kosmodromoj?

Ŝi ridetis:

— Mi komprenas, ke vi ŝercas, sed mi revis pri ĉio ĉi kaj ankoraŭ pri multo.

— Ho!

— Kaj estas profesio kiu povas ĉion ĉi unuigi.

— Ĉu verkisto?

— Jes, preskaŭ. Mi volas iĝi ĵurnalisto, plej bone internacia. Ĉirkaŭvojaĝi Afrikon, Sudamerikon, Ĉinion, Hindion, ĉu vi imagas?

— Kaj kio malhelpis?

Ŝi sopirĝemis.

— Se paĉjo estus viva, mi studus en universitato, sen mono studo estas ja neebla. Panjo perlaboras nemulte, kaj ankoraŭ pli juna fraĉjo... Sed mi nepre studos. Perlaboros monon ĉi tie kaj studos...

Kedrin forgesis ke la tempo pasas,

ke li volis eliri sur la ĉefvojon kaj veturi ĝis la stacio. Kiam li rememoris pri la fluanta tempo, estis jam post meznokto. Al tiu momento li multon eksciis pri Aliona. Ŝi ĉiam estis scivolema infano. “Ŝi ankaŭ nun, — kun rideto pensis Kedrin, — estas la sama scivolema infano”. El la konversacioj kun Aliona Kedrin eksciis, ke en diversaj tempoj ŝi lernis Esperanton kaj Slavonon, la antikvan rusan literaturon, la antikvan ĉinan poezion (en la istokian bibliotekon mirakle trafis kvarvoluma almanako de ĉinaj poetoj), legis Volteron kaj Rousseau’on, ĉinajn kaj japanajn prozistojn kaj poetojn. Pri multaj libroj kaj aŭtoroj, kiujn Aliona menciis, Kedrin nur sciis ke ili ekzistas.

Kun tia vasta sfero de interesoj oni povas esti nur ĵurnalisto. Ŝi (kia saĝa infano) komprenis tion delonge. Fininte la lernejon ŝi jam bone parolis angle kaj germane kaj havis egan deziron lerni aliajn lingvojn: kiel vojaĝi tra Ĉinio parolante nur angle kaj germane? Ŝi volis lerni la ĉinan, sed en la urbata biblioteko ne estis lernolibro. Kedrin iom konfuziĝis: li post la universitato parolas nur rompitan anglan, germane scias du-tri vortojn.

La taverno laboris la tutan tagnokton. Kedrin komence miris: kiu venos meznokte al taverno en urbata limkvartalo? Sed poste li konvinkiĝis, ke vizitantoj venas dum la tuta nokto. La ĉefvojo, kien Kedrin sin direktis, estis tute proksima, ofte ŝoforoj preterpase venis en la taverson, parkis kamionojn apude kaj gaje pasigis tempon, iufoje ĝis mateno. La mastro de la taverno ne eraris, drinkejo sur tiu loko profitis verŝajne sufiĉe bone.

Aliona laboris dek du horojn dum tago, la sekvantan diurnon dek du horojn dum nokto, poste havis du liberajn diurnojn. Sabatoj kaj dimanĉoj tie ne signifis. Hodiaŭ por Aliona estis labora nokto. Komencinte la laboron je la oka vespere ŝi laboros ĝis la oka matene. De tempo al tempo venis kelkaj ŝoforoj, drinkis, kriis kantojn, disverŝis bieron sur tablojn kaj finfine foriris dormi en siajn kamionojn. Venis alia grupeto. Tia estis la tuta nokto.

Kedrin volis paroli, paroli, paroli kun Aliona, sed ŝi ofte foriris priservi vizitantojn. Dum ŝia foresto li gustumis ĉiujn specojn de vodko, trinkis multe, sed tute ne estis ebria. Li estis ekzaltita sen vodko. En lia malplena kaj sopira vivo aperis hela radieto — Aliona.

«Ne, — li pensis, — mi devas ne forlasi tiun junulinon ĉi tie. Ŝi edziniĝos al tia idioto kiu kriis “He, Lenka, muzikon!” kaj oni povas konsideri ke ŝi pereis por ĉiam».

Kio estas lia sento al ŝi? Ĉu kutima amoro de viro al virino? Ho Dio, ŝi povus esti lia filino aŭ eĉ nepino. Kedrin negaje ridis. Aŭ amo de plenkreskulo al infano? Dio, ŝi ne estas lia filino, kia stultaĵo! Sed tamen sen ŝi la ĉirkaŭanta lin mondo estos pli kaj pli dezerta — mortantaj homoj, mortaj arboj, sekiĝintaj riveroj kaj lagoj. Nur ŝi en tiu maljuniĝanta mondo restos juna kaj bela.

Preterirante lin, ŝi ĉiufoje ridetis, pro kio lia koro ĉiufoje degelis. “Kiel ŝi ridetas? — li meditis. — Ĉu bonkore aŭ bonanime aŭ kiel al malnova amiko aŭ ankoraŭ iel?” Subite lin trapikis la penso: “Kiel mi forgesis, ke hodiaŭ devas io okazi? Aha, ĝi jam okazis. La amoro! Nu certe, Aliona ridetas al mi kiel al malnova amiko. Ŝi estas neindiferenta al mi, alie por kio ŝi pasigus kun mi tiom da tempo? Jes, kio devis okazi, jam okazis.

— Aliona, — li diris serioze, kiam ŝi iom liberiĝis kaj sidiĝis kontraŭ li. — Al mi plaĉas via plano iĝi internacia ĵurnalistino. Mi volas al vi ion proponi. Venu en mian urbon kaj eniru en mian universitaton. Mi tie finis la matematikan fakultaton, kaj vi finos la ĵurnalistan. Mi helpos en ĉio kio estos bezonata. Mi ankoraŭ ne renkontis tiajn saĝajn kaj interesajn junulinojn kiel vi.

Aliona nenion respondis, nur ridetis, ŝajnas danke, kaj forkuris labori plu. Nu bone, pensis Kedrin, bone ke ŝi ne diris “ne” kaj ridetis danke. Pri detaloj ni parolu, kiam ŝi finos sian laboron.

Neatendite sur Kedrin ŝarĝis sin la tuta laceco de la pasinta sendorma nokto. La plej granda deziro estis fali sur la pajlon kaj droni en dormo. “Freŝa aero estas necesa, — pensis li, — ĉi tie la atmosfero estas saturita de vodko kaj biero, al diablo, eksteren, eksteren!”

— Aliona, — li diris al la veninta junulino, — mi bezonas eliri, ial laciĝis. Jen la pago, sed mi ankoraŭ revenos. Mia sako kuŝu ĉi tie. Mi baldaŭ revenos...

Aliona mire kaj eĉ time rigardis lin:

— Kio okazis al vi? Vi estas tiel pala!

— Nenio. Ne gravas. Mi iom spiros ekstere kaj revenos. Kaj trinkos ankoraŭ vian firmaan vodkon.

Li iris al la lago. Nun ĝi malprofundiĝis kaj ĝis ĝia bordo estis ĉirkaŭ tricent

metroj. Kedrin lace paŝis, kaj ĉiu sekvanta paŝo estis pli kaj pli malfacila. Kial la gamboj tiel doloras, estas tiel pezaj, kial la dorso kurbiĝas, kial en la oreloj bruas, kion, diablo, ĉio ĉi signifas?

Jen la lago, iam amata kaj nun delonge fremda kiel ĉio en Istoki kaj ĉirkaŭe. Ĉu vere sur tiu ĉi bordo li kun Sergo kaj Petro planis futuron antaŭ... he-e... antaŭ kvardek kvin jaroj? Revis refari la mondon, fari ĝin bela kiel kanto kaj perfekta kiel madonoj de Rafaelo. Knaboj, knaboj.

Kedrin venis al la rando de la bordo, kliniĝis super la akvo kaj vidis — kion? Li fortiriĝis en plena teruro. Ĉu estas li? Li time rigardis ankoraŭ unufoje kaj sufokante teruron longe pririgardis la respeguliĝon. Kompreninte ĉion, li ĝemis, ĝemegis, eble lupe hurlis. El la spegulo de l’ akvo lin rigardis oldulo, proksimume 65–70-jara.

Kedrin malfeliĉe pririgardis sian respeguliĝon, nekonfideme tuŝante la faltoplenan vizaĝon kaj grizan hararon. Ĉu vere? Ĉu povas tiel esti? Hieraŭ ĉio estis: juneco, sano, fortoj, allogeco kaj enigmeco por junaj virinoj, kaj hodiaŭ — ĉio malestas.

Konvinkiĝinte, ke ĉio estas ĝuste tiel, ke ne estas eraro, optikiluzio, miraĝo, li sidiĝis sur malnovan duone disbatitan boaton, kuŝantan renverse sur la bordo, kaj longe sidis senpense, ne sciante, pri kio pensi. La patrino diris ion pri longa kaj feliĉa vivo. Ve! La vivo restis nelonga kaj apenaŭ feliĉa. “Ne meditu, ne meditu pri tio, — li ordonis al si. — Pro tiuj pensoj oni povas freneziĝi”.

Kiam la ruĝa suno leviĝis super la horizonto, li forlasis la lagon kaj direktis sin al la ĉefvojo, penante ne pensi pri la malnova muelejo, la taverno kaj pri la juna kelnerino...

Noto

Pelmenoj (ruse: пельмени). Kuiritaj pastobuloj farĉitaj per viandaĵo, fiŝaĵo, aŭ legomoj, iom pli grandaj ol ravioloj.

Pro ĉi tiu rakonto Miĥail Korotkov iĝis laŭreato de *Liro-2008* en la branĉo “Originala prozo”.



La vojo estas la celo


Verne, Jules. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*: Romano / Tradukis el la franca Jean-Luc Tortel; Antaŭparolo, notoj de Aleksander Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2008. — 208 p. — 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; Vol. 15).

Kiam Stendhal en 1827 vojaĝis de Parizo al Romo, li devintus kalkuli almenaŭ pri 12 ĝis 15 tagoj da vojaĝo. Ĉar Stendhal foje haltis por vidi la allogaĵojn survoje (“du matenoj sufiĉis por Florenco”), por la vojaĝo li tamen bezonis 24 tagojn.

Fileas Fogg, la protagonisto de *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de Jules Verne, estis tute alispeca vojaĝanto. Dum tiu tempo li jam estintus hastinta ĝis ie en Hindlando. Danke al la fidela traduko de Jean-Luc Tortel nun eblas ankaŭ en esperanta vesto refari tiun ekspresvojaĝon ĉirkaŭ la mondo.

Flegmo vetkuras kontraŭ la tempo

Fogg ne estas tradicia vojaĝanto, kiu vidas la mondon por edukaj celoj. Li nur vojaĝas ĉirkaŭ la mondo, ĉar tio estas ebla en la moderna mondo, kaj jen la sola pravigo por fari la vojaĝon. Fogg estas karikaturado de tiel nomata flegma anglo. Verne atribuas al li plurajn ekscentraĵojn. La moderna vivo tre konvenas al Fogg por flegi obsedan akuratecon en sia domo pura, ordigita, severaspekta, puritaneca. Tie horloĝoj indikas ĉie en la domo ekzakte la saman horon. Fogg funkcias kvazaŭ aŭtomate: “Se li promenadis, li ĉiam egalpaŝis sur la marketrita planko de la enireja halo, aŭ sur la rondira galerio tegmentita de kupolo ...” nu ktp.



Afable Verne nomas lian vivmanieron “originala”, sed ĉu li vere ŝatis sian protagoniston?

La novdungita franca (!) servisto de Fogg, Jean Trapasul’, modelita laŭ Sancho Panza, estas fidela apendico al sia mastro. Li estas — kompreneble — pli simpatia ulo, kiu kun admirenda pacienco eltenas la kapricojn kaj ĉiam novajn eltrovaĵojn de sia mastro. Estas tamen li, kiu spertas la mondon dum tiu vojaĝo, estas li, kiu aldonas kalejdoskopan buntecon al la iom banala intrigo de la romano. Alimaniere la libro estus tiel interesa kiel vojaĝtabelo.

Ni elektu hazardan fragmenton por gustumi almenaŭ unu el travivaĵoj de Trapasul’:

Tuj post la foriro de Fiks el la opiejo, du kelneroj portis profunde dormantan Trapasulon al la kuŝejo por la fumintoj. Sed lia fiksa ideo persekutis lin en liaj

songaĉoj; post tri horoj batalante kontraŭ la narkotaĵo li vekigis, skuata de la penso, ke li ne plenumis sian taskon. Li forlasis tiun ebriulan kuŝejon, stumblante, apogante sin al la muroj, falante kaj restariĝante, senhalte kaj nerezisteble pelate el la opiejo de ia instinkto kaj eliris kriante kvazaŭ en songo: “Al Karnatiko! Al Karnatiko!”

Nu, ni ja scias, ke ankaŭ Fileas Fogg havas homan koron, ĉar en Hindlando li savis junan vidvinon de la ŝtiparo, kaj tiel li havis je la fino de la romano almenaŭ virinon por edziĝo, kaj tiel ja finiĝas ĉio en perfekta ordo.

La libro de Verne ja estas historia distrado. Hodiaŭ ĝin ankoraŭ eblas legi kiel ateston de tiu kredo, ke la teknika progreso estas nebremsebla. Tiu kredo sinkis iam, probable kune kun la ŝipo *Titanic*.

Embaraso de riĉeco?

Malnova romano bezonas klarigojn. Je la fino de la libro estas kvin paĝoj kun klarigoj. Kiam mi klopodas traduki ion, mi ĉiam demandas min (kaj ĉiam estas en dubo), kion endas klarigi kaj kio ne nepre estas klarigenda. Tiun dubon mi havas ankaŭ en ĉi tiu eldono.

Ĉu vere estas necesa por la kompreno de la libro, ke Fogg loĝas en numero 14 kaj ne 7 de Savile Row? Kial nur kelkaj vortoj pri la situo de la Reform Klubo, sed nenio pri ĝi kiel angla situacio? Verne ŝatas elmontri sian konon pri la mondo, tre ofte per apliko de iuj faktermoj.

La libron, kiel tiu de Verne, mi volis legi en la ĝardeno, ĉe la plaĝo aŭ por distri min en la trajno. Tiam mi ne nepre havas iun PIVon ĉemane por lerni pri *topveloj*, *stajveloj* kaj *kromĵibo*. Aŭ eble ne ĉiuj memoras, kio estas *thago*. Do por tiuj komplikaj (almenaŭ por mi) vortoj mi ŝatus vidi iun klarigon. Nekompreno de tiuj vortoj ja ne bremzos la komprenon de la libro, sed tamen mi petas alian strategion por espereble estontaj eldonoj de la verkaro de Verne..

En la mondo venis nova sento

Lasta rimarko: Iu Pirro eldonis en 1868 sian *Universalglot*, projekton esence tre similan al la *Lingvo Internacia* de D-ro Esperanto. *Universalglot* falis en la puton de forgeso, sed Esperanto floras. Ĉu eble pro tio, ke intertempe, eblis ĉirkaŭvojaĝi la mondon dum 80 tagoj?

Wolfgang Kirschstein

Internacia literatura konkurso EKRA-2009

Esperantista domo de kulturo *D-ro Ivan Kirĉev* en Razgrado (Bulgario) invitas al partopreno en internacia literatura konkurso pri poezio kaj humuraĵoj, originale verkita en esperanto pri libera temo, EKRA-2009.

La verkoj estu ĝis nun ne publikigitaj en periodaĵoj, premiitaj en aliaj konkursoj aŭ afiŝitaj en interreto. Ilin oni sendu, subskribinte per pseŭdonimo, po tri ekzempleroj al la organizanto: Esperantista domo de kulturo D-ro Ivan Kirĉev, str. Sv. Kiliment 36 ap. 1, BG-7200 Razgrad, Bulgario. La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta fermita koverto, subskribita per la sama pseŭdonimo.

La ĵurio kunsidos 10 jun 2009. La premioj estos esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en la revuo *Literatura Foiro* kaj en la bulteno *Esperantista Tribuno*. La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la esperanta kultura festo *Abritus-2009* (tradicie organizata kunlabore kun *Literatura Foiro*) en Razgrado 12–14 jun 2009.

HeKo

La tria "Beletra Almanako"



Prezentante BA3 Jorge Camacho informas pri kelkaj ŝanĝoj. Ioma pligrandiĝo de la formato havigos pli da spaco, sekve, pli da enhavo. Ekde 2009 oni enkondukas la sistemon de jarabono (planata aperitmo: februaro, junio, septembro), kvankam plu eblos aĉeti unuopajn almanakojn. Estas anoncita la temo de BA4: sciencfikcio, fantasto kaj fabeloj. Bedaŭrinda, laŭ mi, estas forigo de biografieto.

Jam la duan jaron estas prezentataj premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de UEA, kiujn kompletigas la raporto de la Prezidanto, ankaŭ mia ŝatata ĝenro. Humphrey Tonkin konstatas problemojn en ĉiuj konkursaj branĉoj, krom la poezia kaj proza. Precipe malforta en 2008 estis esea branĉo. Ĉu oni provu enkonduki, eĉ se eksperimente por unu jaro, recenzan konkurson?

Cetere, en BA3 la recenza rubriko plu tenas altan nivelon kaj per la nomoj de niaj "verdaj" kritikistoj, kaj per la recenzataj verkoj. Jorge Camacho pri *Ordeno de verda plumo* de Pleadin kaj pri tri monografioj de Korĵenkov (pri Ĉeĥov, pri Dostojevskij, kaj pri la Esperanta gazetar), István Ertl pri *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Seabra, Christian Declerck pri *Verse reversi* de Philippe, Petro Braŭn pri *Suzana kaj la ĉasistoj de muŝoj* de Pío Baroja (tradukis Sarasua). Miroslav Malovec recenzas la kolekton de la Zamenhofaj ideologiaj tekstoj *Mi estas homo*, Keyhan Sayadpour Zanjani — *Kun diablo en la korpo* de Radiguet, Anna kaj Mati Pentus *Princo Serebrjanij* de Aleksej K. Tolstoj (tradukis Ŝidlovskaja).

Aperas mallongaj prozaĵoj de Sten Johansson, Francisco Javier Moleón kaj Luiza Carol. Poezia ĉeestas multe pli abunde per originalaĵoj (Anja Karkiainen, Michael Cayley, Anneke Buys, Carmel Mallia, Gerrit Berveling) kaj tradukaĵoj (Arĥipoeto, Markku Toivonen, Pietru Caxaro, Mihaly Babits, Geo Bogza).

Trevor Steele eseeas pri sia sperto en la grandmonda libroindustrio *Aventuroj de naivulo en la oceano de literatura business*. *Verki poezion en Esperanto* estas prelegoteksto de Baldur Ragnarsson en la Internacia Kongresa Universitato (Roterdamo, 2008).

La titolan kaj enajn paĝojn garnas sep fotoj de Óscar López.

HaGo

Ricevitaj libroj

Baranova, Juratė. *Saĝo kiel terapio = Išmintis kaip terapija*: En la litova kaj Esperanto / Tradukis el la litova Gediminas Degėsys. — Vilnius: Trys žvaigždutės, 2008. — 352 p., il.; 2000 ekz. — [Donaco de LitEA].

d' Arroi, Ŝarlerik. *Senfrokiginto*. — Thaumiers: La KancerKliniko, 2008. — 19 p., il. — (La KromKancerKliniko; №23). — [Donaco de La Kancerkliniko].

Dulce, Julieta. *A Dança das Rosas = Danco de la Rozoj*: En la portugala kaj Esperanto / Tradukis el la portugala Célio Martins. — Rio de Janeiro: CELD, 2008. — 24 p., il. — [Donaco de CELD].

Esperanto. Wie ich es sehe. 5a eld. — [Vieno]: [Klag], [2009]. — 36 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Klar, Walter. *Esperanta filatelo Aŭstria. 1949 ĝis 2008*. — Vieno: Klag, 2009. — 8 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Manlibro pri Olimpikaj vortoj: En Esperanto, ĉina, franca, angla / Prefaco de Chen Haosu. — Beijing: Foreign Languages Press, 2008. — 16 + 190 + 28 p., 6 tabeloj, il. — [Donaco de Li Jianhua].

Mota, Rogério. *Alma nua = Simpla animo*: En la portugala kaj Esperanto. — Rio de Janeiro: CELD, 2008. — 24 p., il. — [Donaco de CELD].

Ricevitaj gazetoj

Aktuala Esperanto, 2009/2; Beletra Almanako, 2008/3; Esperanto, 2009/1; Femina, 2008/16; Heroldo de Esperanto, 2008/16,17, 2009/1; Informilo por Interlingvistoj, 2008/67, 2009/68; La Gazeto, 2009/140; La Movado, 2009/695; La Ondo de Esperanto, 2009/2; La Revuo Orienta, 2008/12, 2009/1; La Sago, 2008/49,50, 2009/51; Litova Stelo, 2008/6; Lumo, 2008/2; Scienco kaj Kulturo, 2008/6; Sennaciulo, 2009/1; Tempo, 2008/101.

Donacoj en 2008

Abonhela fondaĵo

Osmo Buller (NL) 128.00 EUR
Dorota Burchard (PL) 16.00 EUR
Bernhard Eichkorn (DE) 20.00 EUR
István Ertl (LU) 27.00 EUR
E-klubo Munkeno (DE) 62.00 EUR
Jukka Pietilainen (FI) 13.00 EUR
Entute, dum 2008 266.00 EUR

Fondaĵo Amiko

Anonima (RU) 28.50 EUR
Carlos Enrique Artime (ES) 13.00 EUR
Douglas Draper (NO) 40.00 EUR
Jos. Koch (CH) 29.30 EUR
Luis Serrano Perez (ES) 29.00 EUR
Jacques Tuinder (NL) 62.00 EUR
Entute, dum 2008 201.80 EUR

Fondaĵo Ilaro

Anonima (FR) 111.00 EUR
Anonima (RU) 6.00 EUR
Osmo Buller (NL) 35.00 EUR
Choe Taesok kaj
Vida Ĉojene (LT) 200.00 EUR
Michael Cwik (BE) 111.00 EUR
Bernhard Eichkorn (DE) 100.00 EUR
Roger Siarri (FR) 350.00 EUR
Pedro Zurita (ES) 48.00 EUR
Entute, dum 2008 961.00 EUR

Danke al la fondaĵo *Ilaro* en januaro ni aĉetis pli potencon komputilon, kaj ĉi tiu *Ondo* estas la unua, kiun ni faras per ĝi. Post baldaŭa aĉeto de kelkaj pliaj akcesoraĵoj *Ilaro* preskaŭ elĉerpiĝos, sed ni ne intencas fermi ĝin, ĉar modernigado estas io, kio neniam finiĝas, kaj vi povas helpi ĉe tio kaj ĉe abonigo por tiuj, kiuj deziras legi *La Ondon*, sed ne povas mem pagi sian abonon.

Donacojn bonvolu sendi al nia UEA-konto "avko-u", aŭ al vialanda peranto de *La Ondo*. Loĝantoj de Ruslando, Pollando kaj Litovio rekte kontaktu la redakcion por interkonsenti pri la plej oportuna pagomaniero.

Eĉ la plej etaj sumoj estas bonvenaj.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Halina Gorecka

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

gazeto@aol.com http://www.lagazeto.com

Por la januara tasko *Sudoku* venis 15 solvoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Alexandre Serafim (Brazilo), Edmund Grimley Evans, Paul Hewitt, Anne George, Malcolm Jones (Britio), Sylvia Hämäläinen, Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen

4	7	6	3	2	5	9	1	8
3	8	1	7	4	9	2	5	6
9	5	2	8	6	1	4	3	7
8	6	9	5	1	4	7	2	3
2	1	7	6	9	3	8	4	5
5	4	3	2	7	8	6	9	1
1	9	5	4	8	6	3	7	2
6	2	4	1	3	7	5	8	9
7	3	8	9	5	2	1	6	4

(Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Nora Caragea, Hans-Burkhard Dietterle, Gunter Neue (Germanio), Hanna Skalska (Pollando), Jurij Kivajev (Ruslando), Jovan Nikolić (Serbio). Vidu la respondon ĉi-maldekstre.

La loto donis premion al **Alexandre Serafim**.


Ni gratulas lin!

Krucvortenigmo Flaŭro

Enmetu en la retaron de la krucvortenigmo jenajn vortojn: *abio, agropiro, akeno, akteo, amarilido, antiaro, aveno, deo-daro, endivio, evonimo, filiko, framb', kariko, karvio, kokoso, kotono, lariko, nimfeo, papriko, rubuso, stip', vinbero, violago.*

Kiel la solvon sendu al la redakcio la plenigitan krucvortenigmon antaŭ la 30a de aprilo 2009.

Kompilis **Viktor Alikin**



Daniel Salomon, la lanĉinto de la *Sennacia Banko* (vidu la februaran *Ondon*) ĉi-vintre vojaĝis al Japanio, kie li, interalie, instruis kuirarton en Esperanto por gimnazianoj. La instruita plado, kiun Daniel mem inventis, nomiĝis “brezita koko farĉita per ovoj sur spinaco-nesto”. Lia Esperanto-kuirleciono estas spektebla ĉe <http://www.heliko.org/koko.html>.



Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Barbara: Ĉirkon por la popolo!

... niaj propraterenaj aktivadoj ricevu ĉiam pli freŝan kaj atraktician formon. (mesaĝo “Esperanto Tago 15.12.2008 – informa laboro”, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/4169>, 14 dec 2008)

Barbara celebras altan rolon

Ĉi-foje Barbara Pietrzak interpaprolas kun la partopreninto de de la unua Internacia Infana Kongreso, denaskulo Peter Weide. (Gabi Kosiarska, Esperanto Redakcio de Pola Radio, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-l/message/67680>, 23 feb. 2007)

La unufoja lando

La 12-an de decembro 2008 en la universitato de Antverpeno okazis, Belgio... (*Esperanto*, 2009, №1, p. 19; eltrovis Ionel Oneț)

Svisgermanu en Bruselo

[En] Bruselo... loĝas ne sanktuloj sed malsanktuloj au alemanu ordinaruloj... (Renato Corsetti, 14 jul 2008, <http://groups.yahoo.com/group/informado/message/1174>)

Verkema avo ŝatas revuon

Povas esti, ke tiu-ĉi konkurso iom instigos nian esperantistaron al porrevua verkavo. (*Litova Stelo*, 2008, №5, p. 3; trovis Walter Klag)

Dolĉa malkovro

Baldaŭ ni pretigos la organizaĵan stampilon kaj malkovros nian bankan konton. (Audrys Antanaitis kaj Vytautas Šilas, <http://groups.yahoo.com/group/tejsa/message/309>, 23. dec. 2008)

Plukis István Ertl

Juda humuro

Letero al la mastro

Vespere, post la laboro, foriris kune la sekretario kaj la kasisto.

Sekretario: “Jam tedis al mi nia estro. Dum 20 jaroj mi servas lin suferante de lia malbonkoreco, sed ĝis nun mi nenion diris al li. Mi ĉiam retenis min. Sed hodiaŭ mi perdis la paciencon kaj skribis al li leteron.”

Kasisto: “Kion vi skribis en ĝi?”

Sekretario: “Mi skribis ĉion! Mi skribis ke li estas terura homo, tirano, malbonkonduta. Mi skribis ke ĉiuj laboristoj malamas lin. Mi libere verŝis mian koleron je li.”

Kasisto: “Stultulo vi! Kion vi faris? Hodiaŭ vi skribis al li kaj morgaŭ li maldungos vin!”

Sekretario (timigita): “Kial li maldungos min?”

Kasisto: “Li maldungos vin tuj post kiam li legos tion, kion vi skribis pri li.”

Sekretario: “Kion signifas ‘kiam li legos tion, kion vi skribis pri li’? Kiumaniere mia letero atingos lin?”

Kasisto (mirigite): “Ĉu vi ne diris ke vi skribis al li leteron?”

Sekretario (kvietiĝinte): “Certe mi skribis, sed ĉu mi diris ke mi sendis?”

El la kolekto de **Josef Shemer**

Malkovru la belecon de Varmio kaj Mazurio



En Olsztyn, la ĉefa urbo de Varmio kaj Mazurio, 25 jun – 1 jul 2009 denove okazos Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtino (FREŜO).

La evento estos ĉefe turisma, distra kaj ripoza. Krom ĉiutagaj Esperantaj kvizoj kaj konkursoj kun valoraj premioj partoprenantoj povos ĝui la belecon de la regiono kaj de ĝia ĉefurbo dum interesaj ekskursoj.

La programo enhavos vizitadon de urboj: Lidzbark Warmiński, Reszel kaj Świąta Lipka.

En la unua el tiuj ĉi urboj ni vizitos la 14-jarcentan gotikan kastelon — la iaman sidejon de varmiaj episkopoj.

En Reszel ni rigardos kelkajn gotikajn antikvaĵojn: kastelon (vidu sur la supra foto), brian ponton kaj preĝejon kun turo, kien oni povas grimpi kaj observi panoramon.

La vilaĝo Świąta Lipka (Sankta Tilieto) famas pro la belega barokstila baziliko omaĝe al Dipatrino. Tie oni povas aŭskulti eksterordinaran orgenan koncerton en prezento de barokstila instrumento kun moviĝantaj figuretoj.

Krom tio FREŜOanoj vizitos la urbon Olsztyn mem. Ĉi tie oni rigardos gotikajn vidindaĵojn, promenos tra la universitata urbeto, spektos programon en planetario, ripozos en la apudolŝtina arbarĝardeno, kie oni povos admiri arbojn kaj plantojn de diversaj mondopartoj. Por spertaj turistoj estas planata dekkelk-kilometra marŝado tra la Urba Arbaro.

Post tiom da turismaj emocioj, dum la antaŭlasta tago, partoprenantoj manĝos bonguste en la restoracio *Kolorowa*, kie okazos tradicia bankedo.

FREŜO-anoj loĝos en la internulejo de Postlicea Lernejo.

Do, laŭ la vortoj de la himno de FREŜO:

Venu, venu al Olŝtino fine de juni'

Detalajn informojn petu de Elzbieta Leonowicz-Frenszkowska: ✉ 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m. 5, Pollando 📧 efrenszkowska@wp.pl.

Elzbieta kaj Adamo Frenszkowscy

Anonctabulo

Ekde januaro 2009 estas legebla en la reto la kompleta *Sotragogismo*, kvarvoluma verkego de Manuel Halvelik, ĉe www.sotragogismo.net. Ĝi uzas vortare kaj ortografie modifitan Esperanton, intencitan por sciencaj celoj. Tio postulas alkutimiĝon, sed ne malhelpas la komprenon. Recenzo pri ĝi aperos en *Monato*.

En la 22a paĝo de la januara *Ondo* estas eraro. Ŝogi Efendi ja estis nepo de Abdu'l Baha, tamen ne tiu fondis Bahaismon sed Lia patro, Baha'u'llah.



Germanio. Ne nur en la Esperanto-urbo Herzberg, sed ankaŭ en ties ĉirkaŭaĵo Esperanto pli ofte vidiĝas. En ambaŭ ŝoseaj eniroj (el Herzberg kaj el St. Andreasberg) de la vilaĝo Sieber estas instalitaj fraksenlignaj bonvenigtabuloj en Esperanto, dorsflanke de kiuj legiĝas “Ĝis revido”. (GEC/ICH)



Pollando. La vicurbestro de Bjalistoko, Aleksander Sosna, forte subtenas Esperanton. Fine de januaro li dum unu horo rakontis al la redaktoro de *La Ondo* pri la preparado de la 94a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-somere en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. Legu pli en la paĝoj 3–4.



Hispanio. En la mondo ekzistas pli ol mil ZEOj (stratoj, placoj kaj objektoj kiuj havas la nomon Esperanto, Zamenhof aŭ de aliaj esperantistoj). Nenio en tiu vico elstarigus la straton Dr Zamenhof en Valencio, se en ĉi tiu strato ne ekzistus vendejo de seks-varoj. (*Augusto Casquero*)



Bjalistoko atendas vin

